


中國新道

EL POPOLA

CINIO






## Surrokaj statuoj

Foto de YAN JIN

La statuoj sidas sur Baoding-monto nordoriente de Dazu, Sichuan-provinco, Ĉinio. Tie konserviĝas 13 ŝtonaj statuaroj faritaj en la jaroj 1179-1249 kaj la nombro de statuoj estas ĉ. 10 000. La loko estas konata kiel fama trezorejo de la antikva arto de Ĉinio.





## INTER NI

Mi preferas kolorajn pejzaĝojn, montojn, arkitekturojn, artojn...al fotoj faritaj de esperantistoj. Kial vi ne prezentas ĉinajn lokojn?

KLARAY FRANCOISE  
(Francio)

*Ni faris en nia revuo la rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj" por starigi vastajn rilatojn kun diverslandaj foto-amantoj kaj publikigi iliajn verkojn. Tiuj foto-amantoj vivas en malsamaj landoj, kompreneble ili prezentas pejzaĝojn plejparte de siaj propraj landoj. Tial la fotoj aperigitaj en tiu ĉi rubriko ne temas pri ĉinaj vidindaĵoj. S-ino Francoise deziras vidi pli multe da fotoj pri ĉinaj vidindaĵoj, tio estas komprenebla, ĉar en Ĉinio estas multaj ĉarmaj vidindaĵoj, iujn el kiuj nia revuo jam publikigis antaŭe. Ni daŭrigos tion por kontentigi S-rino Francoise kaj aliajn legantojn.*

LA RED.

Mi jam legis la revuon de junio 1991 kaj trovis multe da nomoj. Se vi kiel ni skribas unue la antaŭnomojn, mi legis Lu, Yan, Ling, Liu ktp, sed ne povas scii, ĉu ili estas viraj aŭ virinaj nomoj. Ĉu vi povus indiki tion per S-ro, S-ino, K-do, K-dino ktp..., ĉar ne eblas esperantigi ilin.

RAYMOND SCHWEITZER  
(Francio)

*La propono de S-ro Schweitzer estas tre bona kaj ni akceptos ĝin. Dankon!*

LA RED.

# ENHAVO

- 14 **Por kuna disvolviĝo**
- 6 **Arbaro — la dua Granda Muro de Pekino**
- 32 **Kaŭĉuka plantejo en sudokcidenta Ĉinio**
- 10 **Fenestro de altteknikaj produktaĵoj**
- 30 **Familia sportkunveno**
- 38 **Plej bonaj produktaĵoj al klientoj**
- 37 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 23 **La Heyang-a teatro de tirataj pupoj**
- 42 **Silueta arto de Li Tianhua**
- 20 **Veterana meteologo en la arkta vilaĝo**
- 49 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**
- Ŝtona urbeto ĉe maro
- 26 **Refoja vojaĝo en Hulun Bujr**
- 46 **Vojaĝo sur Baiyangdian-lago**
- 44 **AMUZOJ**
- 36 **MODERNAJ VESTOJ**
- 54 **TRA LA MONDO:**
- Pri Istanbulo

40 **KURANTAJ AFEROJ**

- 18 **Realigo de multjara sonĝo**
- 19 **Mia unua vojaĝo en Ĉinio**

17 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (9):**

Tibor Sekelj

45 **POR KOMENCANTOJ:**

Tridek grajnoj

32 **ESP-NOVAĴOJ**

4 **INTER NI**

35 **KORESPONDI DEZIRAS**

- 2 **Surrokaj statuoj**
- 4 **Flugo**

**SUR LA KOVRILLO:**

Juna mongola luktisto

Foto de **LIU CHUNXI**

**SUR LA DORSKOVRILO:**


[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

En kamparo de Britio

Vortoj priplantitaj per verdaj fazeoloj

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Xishuangbanna (p. 32)
2. Hulun Bujr (p. 26)
3. Zhangjiakou (p. 6)
4. Shitang (p. 49)
5. Heyang-gubernio (p. 23)
6. Mohe-vilaĝo (p. 20)





# Arbaro—la dua Granda Muro de Pekino

Teksto de HENG ZHENJIE

Fotoj de LI CHUNGENG


Verdaĵo sur antaŭe kalva monto

Arbidoj akvumataj



Kampoj kaj forstaj zonoj





Kampanana domo ĉirkaŭita de verdaĵoj

Paŝtejo ĉe arbaro



**A**NTAŬ 11 jaroj la Xinhua-a Novaj-agentejo de Ĉinio publikigis informon, ke “sabla vento ĉiam pli serioze minacas Pekinon”, kio vekis maltrankvilon kaj zorgon ĉe la publiko. Por fortigi kontraŭrimedon al sabla vento, la ŝtato lanĉis en 1986 verdigan inĝenierion ĉirkaŭe de Pekino kaj Tianjin.

Tiu grandioza inĝenierio iris samtempe en 76 gubernioj de Hebei-provinco, la municipoj Pekino kaj Tianjin. En la pasintaj jaroj la Hebei-a popolo jam arbarizis kaj herbizis 670 000 hektarojn da tero ĉirkaŭe de Pekino, kiuj formis protektan zonan ekster Pekino kaj Tianjin. La zono etendiĝas tuj ĉe la antikva Granda Muro, tial ĝi estas honorita kiel la dua Granda Muro.

## ĈE TRABLOVEJO

Fruan aŭtunon mi venis al

Bashang-altebenajo, la plej norda parto de Hebei-provinco. Tie estas trablovejo nordokcidente de Pekino kaj Tianjin. En vintro kaj printempo forta nordokcidenta vento el Siberio trablovas la grandan stepon de Interna Mongolio kaj rekte atakas Bashang-altebenajon, 1 500 m. super la marnivelo. De tie vento senbare atingas la Nordĉinian Ebenajon. Kiam oni rimarkis la severan fakton, ke la flava sablo senĉese minacas Pekinon, la popoloj de la kvar gubernioj sur Bashang-altebenajo en la subprovinco Zhangjiakou, pli ol 200 km. nordokcidente de Pekino, la unuaj prenis sur sin la mision bari sablon.

Tie la klimato estas malvarma kaj sabla vento ofta. Oni diris, ke “blovas jen vento jen sablo, ne troviĝas loĝdomo en spaco de cent km., akvo glaciĝas antaŭ aŭtuno kaj neniam vidiĝas persikaj kaj prunaj floroj.” La nomoj de vilaĝoj estas tre interesaj: “Unu

Arbo”, “Naŭ Arboj”, “Orienta Arbo”, “Okcidenta Arbo” ktp, kiuj pruvis malmultecon de arboj. Estas ege malfacile planti arbojn sur la altebenajo.

Ĉe Xiaopeng-vilaĝo de Kangbao-gubernio estas monto kalva kiel ovo. 200 vilaĝanoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, fosis 10 000 kavojn, vektoportis 20 000 sitelojn da akvo kaj plantis 50 000 arbojn en pli ol 20 tagoj. Post kelkaj jaroj la kalva monto finfine vestis sin per verdaĵoj.

Jin Weijian, vilaĝano de Caoniangou-vilaĝo, Shangyi-gubernio, kontraktis pri verdigo de sabla valo malantaŭ la vilaĝo. Li kulturis arbidojn sur sia malgranda peco da kampo. Li kaj liaj tri infanoj verdigis la valon peceto post peceto. Poste liaj du filinoj edziniĝis, sed ili revenis en ĉiu printempo kaj aŭtuno por helpi siajn gepatrojn planti arbojn. Dank’ al ilia pena kaj diligenta

Inter verdaj arboj





laborado en la sep jaroj, verdiĝis la sabla valo kun areo de ĉ. 35 hektaroj.

En Zhangbei-gubernio, en la areo inter Langwokou kaj guberniurbo kun distanco de 19 km. aranĝe kruciĝas 47 kontraŭventaj arbaraj zonoj protektantaj la kampojn. En Guyuan-gubernio pli ol 60 montoj, 120 montvaloj kaj 12 grandaj kaj malgrandaj trablovejoj ĉiuj estis arbarizitaj. 9 subgubernioj kaj 135 vilaĝoj de la verdiga inĝenierio jam fundamente formis "verdajn murojn" kun longo de 150 km. kaj larĝo de 5 km.

## **GVIDANTOJ, ANKAŬ PIONIROJ EN VERDIGADO**

Por la verdaj muroj benediktane penadis miloj da inĝenieroj kaj teknikistoj de forstokulturo.

Li Baojin, direktoro de la Forstadministracio de Guyuan-gubernio, memvole venis al la subgubernio Huanggainao de Guyuan-gubernio, la plej malvarma loko sur Bashang-altebenaĵo, post sia diplomigo el forstokultura lernejo en 1966. Gvidanto de la subgubernio asignis al li ĉ. 70 hektarojn da virga tero laŭ lia peto kaj disponigis lin je 40 junuloj en forstumado. De tiam li lokis sian hejmon tie kaj laboris pli ol 20 jarojn. En tiuj jaroj li kaj liaj kamaradoj faris sciencajn esplorojn de 23 temoj pri forstumado kaj solvis multe da malfaciloj renkontitaj de lokanoj en forstumado.

Pro sterileco de la grundo kaj sekeco de la klimato la arboj sur Bashang estis malaltaj kaj la trunkoj estis dikaj nur kiel brakoj, kvankam ili jam kreskis 20 jarojn. Post ripetadaj eksperimentoj Li Baojin eltrovis rimedon grefti la "maljunajn arbojn" sur la bonkvalitajn pekinajn poplidojn. Ĉinaj fakuloj de forstokulturo ekspertizis kaj opiniis, ke la plibonigita arbido unua en la lando havas altan valoron de disvastigado. Krome, li faris ankaŭ eksperimenton arbedigi arbon, kio kreis bazon de verda furaĝo por la brutaroj.

Se Li Baojin estas reprezentan-

to de intelektuloj sur la altebenaĵo, do Wang Quan, direktoro de la Subprovinca Administrejo de Zhangjiakou, estas modelo de la ŝtatoficistoj, kiuj pene forstumis kune kun la popolanoj.

Pli-ol-50-jara Wang Quan estas ege fervora por arboplantado. Kiam li estis vicestro de Chicheng-gubernio, la aliaj gvidantoj okupiĝis pri ekspluato de sovaĝaj montoj, dum li kaj aliaj arbarizis 10 000 hektarojn da tero per pinoj. Poste li laboris en Zhangbei-gubernio, kaj tie li kune kun la popolo arbarizis 14 600 hektarojn da tero en unu jaro. En 1983 Wang Quan ekfunkciis kiel direktoro de la Subprovinca Administrejo. Resuminte la sperton de iuj lokoj, kie oni plantis kaj arbojn kaj herbojn kaj kulturis pomarbojn, vinberujojn kaj aliajn ekonomiajn arbojn, li proponis la metodon "planti arbojn, arbedojn kaj herbojn kune", "kulturis samtempe ventoŝirman, materialan kaj ekonomian forstojn". Sole la ekonomiaj forstoj kulturitaj en la lastaj jaroj en la regiono kovris 27 000 hektarojn da tero.

## **FAVORO DE VERDAĴOJ**

Sur la altebenaĵo regas kontinenta musona klimato de frosta mezvarma zono, ventegoj de pli ol 7 gradoj furiozas 63 tagojn ĉiujare, kaj la senprujna periodo estas 90-110 tagoj, sabla grundo konsistigas 3/4 de la totala areo. Tiuj naturaj kondiĉoj formis latentajn faktorojn de sablaj katastrofoj.

Tiutage, kiam mi atingis Zhangbei-gubernion, estis blovanta ventego de 6-7 gradoj, sed la ventego estis sensabla. Tion mi atribuis al fakto, ke tiam estis frua aŭtuno, kreskis prosperaj arboj, herboj kaj grenplantoj, kaj krome protektis la sablobaraj arbarzonoj. Nun, ĉe la limo inter Bashang-altebenaĵo kaj la stepo de Interna Mongolio jam aperis kontraŭventa forsto 5 km. larĝa kaj 800 km. longa, en la regionoj laŭ Bashang la kontraŭventa forsto sume longas je 700 km. kaj larĝas je 20 km.,

kaj plie la malaltmonta terkonserva forsto kaj kampaj arbaraj retoj sur monteto kaj ebenaĵo en la 8 gubernioj sub Bashang-altebenaĵo jam formiĝis en 4 defendliniojn kontraŭventajn kaj kontraŭsablajn. Ili baras la frostan aerfluron el Siberio, protektas la kampon kaj ankaŭ certgrade plibonigas la aeran medion de Pekino. Sablaj kaj polvaj tagoj reduktiĝis de 29 tagoj antaŭ 8 jaroj al 8.8 tagoj ĉiujare.

Survoje mi vidis, ke multaj arboj altis 8 m., la ventorapido mallofe de la arbarzono multe reduktiĝis kompare kun tiu en la senarba loko. Ekz. la 13-an de majo 1980 en Linyuan-vilaĝo de Guyuan-gubernio ventego forblovis tertavolon 6 cm. dikan de la senarba zono, sed nur 0.4 cm. de la arbarizita loko. Samtempe la tera temperaturo iom altiĝis kaj la senprujna periodo plilongiĝis je 11 tagoj.

Pro plibonigo de la regiona klimato, plejparto de la vilaĝoj sur la altebenaĵo plantis frostorezistajn fruktarbojn, kaj tiel finiĝis la historio sen persikaj kaj prunaj floroj.

Disvolviĝo de forstokulturo malfermis sufiĉajn herbejojn por Bashang-altebenaĵo, kiuj ĉiujare liveras 300 milionojn da kg. da sekaj furaĝoj, kaj solviĝis la problemo de manko de furaĝo en vintro. Kvar gubernioj sur la altebenaĵo jam fariĝis bazlokoj de brutoj, ĉar ili bredas 177 000 bovojn, 1 423 000 ŝafojn kaj 3 668 000 kuniklojn.

Antaŭe sur la altebenaĵo terure mankis ligno, la kamparanoj devis iri centojn km. da vojo por aĉeti lignon. Nun la totala lignorezervo de la kvar gubernioj sur la altebenaĵo jam atingis 600 000 kubmetrojn. Oni jam povas liveri al kamparanoj lignon sufiĉan por konstrui domojn, kaj ankaŭ solviĝis la problemo de hejtaĵoj.

La arbaraj zonoj sur la altebenaĵo daŭre etendiĝas. ■

# FENESTRO DE ALTTEKNIK

Teksto de LI QIANG

Fotoj de CAI HAIFENG




En la halo de la centro

Aĉeto de aŭdvidaj aparatoj



La informejo de iu kompanio en la centro



# AJ PRODUKTAĴOJ



Montrorankoj por novaj konstrumaterialoj

En oficejo de Stone



En la okcidenta antaŭurbo de Pekino estas regiono difinita en 1988 kiel eksperimentejo de nov-teknikaj produktaĵoj. Ĉe la plej suda parto de la regiono staras domo de la Pekina Biblioteko kun ĉina stilo. Ĝi estas ŝtata biblioteko de Ĉinio. Lastatempe estis starigita norde de ĝi domo kun vitraj muroj, kiu harmonias kun ĝi. La domo servas kiel la Scienc-teknika Komerca Centro de Ĉinio, la unua speciala altteknika merkato de la lando.

Enirinte la pordon de la centro, vi trovas pompan rondan halon. Meze de ĝi vi povas vidi, ke la konstruaĵo estas trietaĝa. En ĉiu etaĝo funkcias dekel-kaj kompanioj kaj iliaj eksponaj ĉambroj estas septitaj unu de alia per vitraj muroj. Irante en la koridoro, vi povas vidi eksponaĵojn tra vitra muro. Se vi interesiĝas pri io, vi povas eniri eksponejon kaj paroli kun la mastro pri negoco.

La domo de la Scienc-teknika Komerca Centro de Ĉinio estas konstruita sub la aŭspicioj de la kompanio Tuxin. S-ino Zhao, vicdirektoro de la Departamento de Publikaj Rilatoj de la kompanio, kondukis min en sian kabineton. Ŝi diris, ke la kompanio estas regata de la Pekina Biblioteko kaj administras la centron.

Antaŭ la konstruado de la centro la kompanio Tuxin kontaktiĝis kun 43 firmaoj en la eksperimentejo kaj kolektis 24 milionojn da juanoj. La konstruado komenciĝis decembre de 1989 kaj finkonstruiĝis la moderna domo kun plankareo de 15 300 kvadrataj metroj. La 11-an de majo 1991 la centro elfunkciis.

Akompanate de s-ino Zhao, mi venis al la informejo kun granda elektronika ekrano, kiu senĉese komunikas diversajn datenojn. Vicdirektoro Zhao diris al mi, ke la tiea konsultejo kun datenbanko pri komercaĵoj estas sub la Informa Departamento de Tuxin kaj donas informojn pri ĉiuj kompanioj. En la konsultejo iu, kiu antaŭ nelonge diplomitiĝis el

altlernejo, diris al mi: “La centro havas sume 80 kompletojn da malfermaj eksponaj ĉambroj, kaj nun 49 firmaoj eksponas tie ĉirkaŭ mil altteknikajn produktaĵojn.” Je tio, li enmetis instrukciojn en la komputeron kaj sur la ekrano tuj montriĝis datenoj pri la nomoj, normoj, trajtoj kaj prezoj de produktaĵoj de la kompanio kaj ĝiaj servoj postvendaj.

Tia servo faciligas al klientoj kompari la kvalitojn kaj prezojn de varoj kaj servojn de firmaoj, antaŭ ol rigardi specimenojn. Ĝi estas fenestro de eksponataj produktaĵoj de firmaoj. Tio metas al la firmaoj pli severan postulon: la firmaoj, kiuj faras tie konkurencon pri kvalito, tekniko, prezo kaj servo, nepre devas havi solidajn teknikojn, fajnajn produktaĵojn kaj perfektan servon. Sen ili la firmaoj ne povas ekzisti. Tio multe akcelas la disvolviĝon de la altteknika industrio.

Dekstre de la informejo estas la ĝenerala kontoro kaj komerca centro, kiuj donas poŝtan, telekomunikajn kaj bankajn servojn. S-ino Zhao informis al mi, ke oni starigos en la centro eksponejon de fajnaj produktaĵoj de altteknikaj ekspluataj regionoj en Ĉinio kaj datenbankon pri komercaĵoj por doni perfektan servon al klientoj kaj altteknika merkato.

Tiu ĉi moderna scienc-teknika komerca centro havas 1 2000-sidlokan halon kun modernaj ekipaĵoj, kiaj aparatoj de simultana interpreto kaj tiu de televida resendo, plurfunkcian kunvenejon kun aparato de seslingva simultana interpreto, kinejon kaj restoracion, kiu havas kafejon, balejon kaj dancejon kaj povas enteni sume 400 personojn.

La 49 firmaoj, luprenis eksponajn ĉambrojn en la centro. Inter ili iuj estas ŝtataj, aliaj — privataj, kaj triaj — potenciaj en Ĉinio. Kvankam la centro funkcias nur tri monatojn, tamen ĉiuj firmaoj multe spertis ĝiajn funkciojn.

Stone estas granda kompanio, kiu havas plurajn eksponajn ĉambrojn en la unua kaj dua etaĝoj. Ĝia

Ludo de elektronika piano



vendejo por kabinetaj mebloj estas en la unua etaĝo, kie oni povas vidi diversajn modernajn tablojn, seĝojn kaj ŝrankojn. En la dua etaĝo la kompanio eksponas elektronikajn produktaĵojn. La ĉinlingva vorttraktilo, produktita de ĝi, interesis min. La traktilo estas facile portebla kaj oportuna precipe por raportistoj aŭ ĵurnalistoj. Ĝi kostas 4 800 juanojn.


Stone eksponas muzikan komputersistemon, kiu kapablas fari muzikludon, komponadon, orkestradon, redaktadon kaj partituron. Pro tio la sistemo estas ŝatata de muzikistoj. La laborantoj de Stone kontentas, ke Stone havas plian fenestron por eksponi siajn novajn produktaĵojn en la Scienc-teknika Komerca Centro de Ĉinio.

La novteknika ekspluata centro Tianchen estas alia altteknika entrepreno. En la pasinteco la firmao havis sian oficejon en malproksima antaŭurbo de Pekino, tial ĝin vizitis malmulte da klientoj. Por konstrui la centron Tianchen investis 160 000 juanojn. Nun ĝi havas sian eksponejon en la dua etaĝo. La firmao vendas tie elektronikajn produktaĵojn kun apartaj trajtoj, kiaj privata aŭtomata branĉa centralo kun 300 lineoj kaj vidtelefona sistemo, kaj prenas sur sin ankaŭ la taskon projekti softvarojn de informa traktado, datenbanko kaj komputera reto. Direktoro de la Privenda Departemento Wang Lei diris al mi, ke lia firmao estas malgranda, tamen tri monatojn post la malfermiĝo de la firmao ĝi progresas kaj famiĝas tagon post tago. Li havas plenan fidon por bone administri la eksponejon.

Mi vizitis ankaŭ la kompanion Wangma. Ĝi estas privata kompanio kaj fondiĝis antaŭ du jaroj. Tamen, dank' al ekspluatado de originala produktaĵa serio, la kompanio fariĝis granda kompanio multe konata.

Estro de la Privenda Departemento de la kompanio Zhang Chao diris al mi, ke la firmao havas entreprenon funkciigatan kune kun alia lando kaj

La domego de la centro



starigis 73 agentejojn, 38 trejnajn centrojn kaj ankaŭ aliajn 5 agentejojn en Usono, Singapuro kaj Hongkong. En la Scienc-teknika Komerca Centro de Ĉinio la firmao havas plian fenestron por eksponi siajn produktaĵojn, kio certe akcelos la disvolviĝon de la kompanio.

Nun en la centro koncentriĝas multaj altteknikaj firmaoj kaj eksponiĝas granda kvanto da altteknikaj produktaĵoj, tamen klientoj estas nemultaj. Laŭ la opinio de Zhang Chao, oni devas ne nur modernigi administradon, sed ankaŭ famigi la centron, ĉar estas 26 tiaj regionoj en Ĉinio, sed nur unu merkato de altteknikaj produktaĵoj, kiel la Scienc-teknika Komerca Centro de Ĉinio. ■

## Abonu "El Popola Ĉinio"

Nun komenciĝas nova abonvarba kampanjo 1992 por "El Popola Ĉinio". EPC kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj E-movado en kaj ekster-Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas EPC en la kampanjo (de 1991.11.20 ĝis 1992.02.29), ricevos kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

### ABONTARIFO DE EPC

(Ekvalidos la 20-an de novembro 1991)

lando	Valuto	1 jaro
Aŭstralio	AUD	33.00
Aŭstrio	ATS	320.00
Belgio	BEF	936.00
Germanio	DEM	45.50
Britio	GBP	15.50
Finnlando	FIM	111.00
Francio	FRF	150.00
Italio	ITL	34000
Japanio	JPY	3600
Nederlando	NLG	51.00
Nov-Zelando	NZD	45.00
Svisio	CHF	39.50
Usono	USD	26.00
Kanado	CAD	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:		
	USD	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		
	USD	9.50

# POR KUNA

**S**-RO Song Zhaotang kaj liaj du kolegoj el Malajzio jam 5-foje venis en Dalian. Per kio tiel forte allogis ilin Dalian, la plej grava haveno de nordorienta Ĉinio?

Kiel direkciaĵoj de la Selango-  
ra Ĝenerala Firmao de Elmigrin-  
taj Ĉinoj en Kuala-Lumpuro, ili  
venis de malproksime por parto-  
preni en la Dalian-a foiro kune  
okazigita de la provincoj Liaoning,  
Heilongjiang kaj Jilin de nordor-  
ienta Ĉinio kaj la Aŭtonoma Re-  
giono de la Interna Mongolio. Pro

la abundaj komercaĵoj en la foiro,  
ili ĉiufoje subskribis komercan  
traktaton je milionoj da usonaj do-  
laroj.

Ekde 1987, la tri provincoj de  
nordorienta Ĉinio kaj la Interna  
Mongolio kune okazigis julie en  
Dalian foiron, kie vendiĝis ĉ.  
10 000 specoj da agrikulturaj, flan-  
kokupaj, lokaj kaj specialaj pro-  
duktaĵoj kaj krudaj materialoj, pro  
tio ĝi altiris al si multajn komercis-  
tojn el diversaj landoj.

Julie de 1991, la 5-a foiro okazis  
en la nove finkonstruita Internacia

Foirejo. Ĝin partoprenis ĉ. 3000  
komercistoj el pli ol 40 landoj kaj  
regionoj. S-ro Tao Jian, responde-  
culo de la foiro, diris, ke en la  
10-taga foiro oni subskribis trakta-  
tojn de 659 milionoj da usonaj do-  
laroj, je 45.3% pli multe ol tiu en la  
4-a foiro.

En nordorienta Ĉinio sterniĝas  
senlima fekunda kampo kaj ĝi es-  
tas abunda je riĉfontoj. Heilongjiang-provinco estas riĉa je  
petrolo, sojfaboj, maizo, tritiko kaj  
aliaj grenoj. Tie estas Daqing-  
petrolkampo, la plej granda de

Inaŭguro de la foiro



# DISVOLVIĜO

Ĉinio. Ĝi estas ankaŭ la grava maŝin-industria bazo. Jilin-provinco havas potencon en aŭto-produktado kaj kemia industrio. Ĝia produktokvanto de ginsengoj kaj junaj cervokornoj okupas la unuan lokon en Ĉinio. Kiel pez-industria bazo de la lando, Liaoning-provinco posedas 26 000 entreprenojn kaj ĝia industria produktokvanto en 1990 atingis 166.6 miliardojn da juanoj (unu usona dolaro egalas al 5.40 juanoj). Por la Interna Mongolio la ĉefa okupo estas brutobredado. Ĝia produktokvanto de ŝafa lano konsistigas duonon de tiu de la tuta lando. Ankaŭ mineralaj riĉfontoj estas abundaj. Ĝia rezervokvanto de rara tero okupas la unuan lokon en la mondo.

En la komenco de la 80-aj jaroj, pro manko de kunordigo estis malfacile por ekonomio kaj ekstera komerco de tiuj regionoj eniri rapide kaj en granda skalo en internacian

merkaton, malgraŭ ilia penado. Pro tio ili ĉiamaniere serĉis novan, pli larĝan vojon de la ekstera komerco. Jen naskiĝis la ideo kunlabori inter la tri provincoj de nordorienta Ĉinio kaj la Interna Mongolio por la kuna disvolviĝo.

En majo 1986, en kunveno pri ekonomio kaj komerco ĉeestita de respondeculoj de la tri provincoj kaj la Interna Mongolio, oni proponis komercan, ekonomian kaj teknikan kunlaboron, por ke ili kune organizu foiron en Dalian por akceli la pordmalfermon kaj ekonomian disvolviĝon de la tri provincoj kaj Interna Mongolio. La propono estis tuj aprobita.

En julio 1987, la unua foiro sukcese okazis en Dalian. Ĝin partoprenis pli ol 2 100 komercistoj el 30 landoj kaj regionoj. Tiufoje oni subskribis traktaton je 264 milionoj da usonaj dolaroj, kiuj superis la normon je 76.1% kaj unuapaŝe

montris la superecon de la kunlaboro. Kaj la du sekvintaj foiroj akiris pli da sukcesoj. Jen pro kio foiro okazas ĉiujare.

La respondeculoj de la komercaj delegacioj de la tri provincoj kaj la Interna Mongolio havis grandan esperon kaj konfidon al la 5-a foiro.

S-ro Du Xianzhong, ĉefo de la komerca delegacio kaj vicestro de Heilongjiang-provinco, diris, ke lia delegacio alportis al la foiro pli ol 2 500 specojn da produktaĵoj. Videblis, ke la foiro floris pli kaj pli pompe. Antaŭe, la ekstera komerco de Heilongjiang-provinco estis katenita de tio, ke la provinco troviĝas malproksime de maro kaj la trafika kondiĉo estas malbona. Dank' al la Dalian-a foiro, 60-70% de ĝiaj varoj eksportiĝas de Dalian-a haveno ĉiujare.

“La foiro multe helpas nin en kono de internacia merkato kaj ar-

Komerca traktado



S-ro Du Xianzhong





Alilandanoj aĉetas vestojn en la foiro.

anĝo de la eksportaj varoj,” diris respondeculo de la komerca delegacio de Jilin-provinco. Nuntempe Jilin-provinco eksportas ne nur maizon kaj ginsengon, sed ankaŭ multajn alispecajn bonkvalitajn produktaĵojn. Iu hongkong-a komercisto diris: “Sovaĝaj legomoj estas multe ŝatataj en la internacia merkato kaj precipe pteridoj kaj sekigitaj taglilioj produktataj de Jilin-provinco.”

La ĉefo de la komerca delegacio de la Interna Mongolio opiniis, ke la ekonomia bazo kaj ekspluataj fortoj de la Interna Mongolio estas malfortaj kompare kun tiuj de marbordaj regionoj, tio detenis ĝian eksteran komercon. En la Dalian-a foiro, la Interna Mongolio profitis helpate de aliaj provincoj. Nun, pli ol 1300 komercistoj el 70 landoj kaj regionoj havas komercan rilaton kaj ekonomian kaj teknikan kunlaboron kun la Interna Mongolio.

La 70-jara s-ro Wang Luming, membro de la foira prezidantaro, estas unu el la iniciatintoj de la foiro. Li tiel taksis la Dalian-an foiron: 1. Dank’ al la 5 foiroj formiĝis la kanalo, tra kiu la produktaĵoj de la tri provincoj kaj Interna

Mongolio eniras en la internacian merkaton. 2. La foiroj okazis pro la sukcesa utiligo de la haveno kaj la supereco de la ekonomio de nordorienta Ĉinio, kaj la foiro-okazigantoj, kiuj reciproke subtenis, konfidis, kunlaboris, kune dividis riskojn kaj interesojn.

Pli kaj pli multaj komercistoj partoprenis en la foiro. Krom la tri provincoj kaj Interna Mongolio, ankaŭ pli ol 60 fakaj eksterakomercaj kompanioj kaj entreprenoj el 20 provincoj kaj urboj partoprenis en la 5-a foiro. Tio montris, ke la foiro forte altiris al si komercistojn kaj ĉiuj partoprenantoj profitis de ĝi. La estro de Jilin-provinco diris, ke en la estonteco Jilin sola ne okazigos foiron, ĝi prenos la Dalian-an kiel sian propran.

Dank’ al la senĉesa disvolviĝo de ekstera komerco de la tri provincoj kaj Interna Mongolio, la Dalian-a haveno fariĝis unu el la plej grandaj eksterakomercaj havenoj de Ĉinio. En la pasintaj 4 jaroj la totala import-eksporta valoro tra la Dalian-a haveno estis 34.15 miliardoj da usonaj dolaroj kaj kreskis meznombro je 6.8% ĉiujare. De ĝi multe profitis la tri provincoj kaj Interna Mongolio. ■

## HOMOJ NEFORGESEBLAJ (9)

de CHEN YUAN

**R**IGARDINTE foton, kiun s-ro Sekelj montris al mi kaj faris antaŭ 30 jaroj, kiam mi akompanis lin sur la Granda Muro, mi preskaŭ ne kredis miajn okulojn. La foto aperis en iu numero de “Esperanto”, 1957.

La afero estis en januaro 1957. Ĵus neĝis. En Badaling, parto de la Granda Muro, estis neniu homo krom ni. S-ro sekelj sidis sur parapeto de la Granda Muro kaj mi staris apud li. Tiam ni estis junaj. Mi estis apenaŭ 40-jara kaj li iom pli aĝa ol mi. Mi memoras, ke tiutage estis tre malvarme kaj nur mi akompanis tiun vojaĝiston — “aventuristo” — en vizito de tiu monda miraklo. Sur revenvojo de Ming-tombejo, ĉe kies flankoj staras ŝtonaj homoj, ĉevaloj kaj kameleoj, li elaŭtiĝis de tempo al tempo por foti ilin kaj kampanon rajdantan sur azeno aŭ kampanon kondukantan kamelon. Li estis etnografo kaj muzeologo. Li vojaĝis tra la mondo kaj ĉion volis foti.

S-ro Sekelj la unuan fojon vizitis Ĉinion kune kun jugoslava delegacio de blinduloj. Li prezentis al la gastiganto sian peton renkontiĝi kun ĉinaj esperantistoj, kaj mi en la nomo de la Ĉina Esperantistoligo regalis lin en la restoracio de la Pekina Hotelo. Mi ne kontaktiĝis kun la delegacio, ĉar li diris, ke en la delegacio troviĝas neniu alia esperantisto.

Sur la vojo al kaj de la Granda Muro li rakontis al mi multajn historiojn pri sia “aventuro”. Nun mi memoras nur ke li loĝis 3-4 monatojn en primitiva tribo en valo de Amazono en Suda Ameriko kaj eĉ



# Tibor Sekelj

kontaktiĝis kun primitiva tribo de kanibaloj. Ĉio, kion li rakontis, interesis min. Iujn el liaj anekdotoj mi legis en ekzempleroj de geografia gazeto en Esperanto, kiujn li donis al mi (post nur kelkaj numeroj ĝi ĉesis eldoniĝi).

Post 30 jaroj, t.e. en 1986, li refoje venis en Ĉinion por partopreni la 71-an UK en Pekino. Li diris al mi, ke ĉi-foje li estas multe pli ĝoja ol en 1957 pro la granda ŝanĝiĝo de Ĉinio en tiuj 30 jaroj. Li denove aperis sur la Granda Muro. Sed ĉi-foje li grimpis kune kun kongresanoj. Ĉu li tiumomente rememoris la senhomecon de la Granda Muro antaŭ 30 jaroj? Certe. Ne estis facile por li konservi la foton kaj eĉ doni la grandigi-

tan foton al mi. Li estis malnova amiko de Ĉinio.

Poste ni renkontiĝis en internacia simpozio pri socilingvistiko en Tokio. Posttagmeze de la sekvanta tago li faris prelegon titolitan "Ĉu la socio bezonas internacian lingvon?" Li asertis, ke la internacia lingvo kiel Esperanto neŭtrala, facile ellernebla kaj uzebla en diversaj kampoj estas ne nur bonvena, sed ankaŭ ununura lingvo por solvi la lingvan problemon en la nuna tempo, kiam la mondo alfrontas ĉiam pli kreskantan lingvan ĥaoson. Li ne diris multe, ĉar oni ankoraŭ ne konis la utilecon de la artefarita lingvo kaj ankoraŭ hezitis.

En 1989, kiam Li Yuping, raportistino de Radio Pekino, invitive vizitis Jugoslavion, ŝi renkontis s-ron Sekelj en iu urbo. Reveninte, ŝi transdiris al mi lian inviton, ke mi aliĝu al la Esperantlingva Verkista Asocio, kaj mi tion faris. Sed poste mi ne havis ŝancon partopreni UK kaj ne plu vidis lin.

Informiĝinte pri lia forpaso, mi malĝojis. Neatendite forpasis la "aventuristo", kiu sin dediĉis al Esperanto, kun granda fervoro, vigleco kaj energio. Nun mi refoje ricevis cirkuleron pri EVA-kunsido okazonta en Havano. La maljuna generacio foriris kaj la postevenintoj antaŭenigas la Esperantan aferon. ■

La aŭtoro (la unua de dekstre) kaj s-ro Tibor Sekelj (la unua de maldekstre) en Tokio, 1986



# Realiĝo de multjara sonĝo

de DIETRICH MEUSEL (Germanio)

*Ĉi-kune estas du kontribuoj de esperantistoj de Germanio kaj Francio, plenaj de impresoj ricevitaj en ilia vojaĝo en Ĉinio. Kun bedaŭro ni mallongigis ilin pro nesufiĉeco de paĝoj.*

La Red.

Berlino, la 13-an de majo 1991, je la kvara horo. Aeroplano Boeing 767 de Ĉinio startis kaj portis min ĉielen rekte al Pekino. Nun finfine komenciĝis la realiĝo de mia multjara sonĝo. Por du semajnoj mi estos gasto en Pekino. Imponas sento por mi koniĝi kaj travivi multe de tio, kion antaŭe mi legis kaj aŭdis pri Ĉinio kaj precipe pri Pekino.

Mi vizitis en granda admiro multajn mondfamajn vidindaĵojn, kiel ekzemple Tian'anmen-Placo, la Imperiestra Palaco en la "Malpermesita Urbo", la Ming-Tomboj, la Granda Muro, la Somera Palaco ktp.

En la dua semajno mi havas riĉenhavan neforgeseblan restadon en Pekino. Mi intencis revidi la Esperantistinon Zhou Qianyun, kiu en la jaro 1986 estis gasto de mia urbo kaj ĉe mi hejme. Same nepre mi volis konatiĝi kun miaj du korespondantoj Wang Lihua kaj Liu Beihai. Krome mia Esperantoamiko Rudolf Burneister petis min kontakti kun liaj amikoj. Kelkaj telefonaj interparoladoj sufiĉis

por akiri la bezonatajn kontaktojn.

Ĉiutage akompanis min du aŭ tri junaj esperantistoj. Ne ŝparinte klopodojn kaj kostojn ili helpis al mi viziti plurajn vidindaĵojn kiel ekzemple la Granda Halo de la Popolo, la stalaktita kaverno, Pekina Opero ktp. Sed ankaŭ pere de ilia helpo mi ekkonis la ĉiutagajn ĝeneralajn vivmanierojn, kiel la mallarĝaj stratetoj, veturo per rikio, matenan gimnastikan ekzercon (Tajĝiĉjuan) aŭ bazaron kun diversaj metio-standoj kaj birdofiro. Kun sinjorino Wang Lihua kaj ŝiaj edzo kaj filo mi vizitis la bestĝardenon kaj la sporturbeton kun stadionoj de la pasintjare okazinta Azia Sportkunveno. Kiel gasto ĉe familio Wang kaj ankaŭ de amiko Zhu (autaŭnomo?) en iliaj loĝejoj mi travivis agrablajn horojn kun multege da bongustaj ĉinaj manĝaĵoj. Ankaŭ akompanis min la amikoj Li Shijun, Zhang Depu kaj Qin Kaiji. Dank' al ili mi vidis multe, kion la simpla turisto ne povas ekoni, ekzemple por mi estis aventuro mem veturi per biciklo meze de la biciklomarĝo (en Pekino ekzistas

7 milionoj da bicikloj kaj plejparte ĉiutage survoje).

La lasta tago de mia restado en Pekino estis la kulmino. Okazis Esperantokunveno de 40-50 partoprenantoj por min gastigi.

Laŭ peto mi prelegis pri la proceso de la unuiĝo de ambaŭ germanaj ŝtatoj kaj poste respondis al diversaj demandoj. Dum tiu prelego funkciis sonbendo de Radio Pekino en Esperanto.

Per vortoj preskaŭ nepriskribelaj estas miaj travivaĵoj kaj impresoj. Tian imponan restadon oni nepre devas mem travivi. Pro tio kaj ligite kun la propono de Li Shijun nun mi provas organizi vojaĝogrupon por la sekvonta jaro, por ke aliaj esperantistoj el Germanio povu travivi similan kiel mi kaj konvinki sin pri la beleco de Pekino kaj la vigla Esperantomovado. Miaj esperantistoj baldaŭ legos pri pliaj detaloj de tiu projekto en la germana Esperantogazeto.

Ankoraŭfoje la plej koran dankon al ĉiuj pekinaj esperantistoj.

Ĝis la revido - espereble jam sekvontajare.

## La solvo por "Kalkulu"

La ĵurnalo ne fanfaronis.

Se duoble faldi ĵurnalon, la nombro de tavoloj

regule progresivas laŭ ciferoj 1, 2, 4, 8, 16, 32, ... Se duoble faldi ĵurnalon 30-foje, la nombro de tavoloj devas esti  $2^{30}$ . Tiele faldite 30-foje, la alto de la ĵurnalo estas 107 374 m, kompreneble multe pli alta ol Ĝomolangma.

# Mia unua vojaĝo en Ĉinio

De PATRICK DAIZE (Francio)

Jam de longe, mi revis viziti tiun landon, kiu ŝajnas tiel malproksima kaj mistera al ni. Fine, mia revo efektiviĝis. Mi povis propraokule vidi aŭtobuse, trajne aŭ piede ĉion, kion mi legis revante en "El Popola Ĉinio".

Kun la grupo de inĝenieroj kaj teknikistoj de la Franca Instituto de Petrolo (IFP), mi povis vojaĝi tra Ĉinio dank' al la redakcio de EPC kaj precipe dank' al nia samideano Ni Dongyang kaj la Esperanto-Servo de la Ĉina Paca Internacia Turisma Agentejo, kies vicprezidanto, samideano kaj amiko Gong Peikang, kiuj ĉion faris por ke ni estu feliĉaj dum nia restado en Ĉinio.

Tiu vojaĝo, dudek tri tagojn longa, de Pekino ĝis Kantono, multe interesis min kaj plaĉis al ni. Ni vizitis tre interesajn urbojn kaj pejzaĝojn: Pekino, Datong, Taiyuan, la Montaro Wutaishan, belegaj ĝardenoj en Suzhou kaj Wuxi; ni ĝuis neforgeseblajn pejzaĝojn de Guilin (Lijiang-rivero), Nankino, Ŝanhajo, Kantono; interesis nin multaj fabrikoj kaj kulturaj centroj.

Krom mirindaj pejzaĝoj kaj bonakceptaj loĝantoj, unu el la plej bonaj momentoj estis mia unua renkonto kun ĉinaj esperantistoj. Neniam antaŭe mi havis okazon



Membroj de la franca vojaĝgrupo gvidata de s-ino Zorka ENIZAN en Xiangshan-parko de Pekino

praktiki la internacian lingvon. Kia plezuro estas babili (eĉ malfacile ĉar mi estas komencanto) kun aliuloj, kiuj ne parolas saman lingvon kiel mi.

En la Franca Instituto de Petrolo ĉiuj jam kutimas al organizado de vojaĝo al Ĉinio. En la Jaro de Ĉevalo 18 personoj el ni vojaĝis grupe laŭ la Silka Vojo; en la Jaro de Ŝafo 20 personoj el ni grupe vojaĝis de la nordo ĝis la sudo de Ĉinio. Kial tiel bone funkcias la organizado de la grupvojaĝo ĉe ni? Ĉar ĉiuj enskribiĝintoj amas Ĉinion. Kial ili amas Ĉinion? Ĉar en IFP, de 10 jaroj, laboras kaj studas ĉinoj kaj ili ĉiuj semas la amon pri Ĉinio. Nuntempe la 38 personoj, kiuj jam vizitis Ĉinion, tiel

bone amikiĝis, ke ili vivas kiel unu sola familio. Ili komunikas siajn ĝojojn kaj impresojn al aliaj kaj nun multaj interesiĝas kiam kaj kie okazos la proksima vojaĝo.

Dankon al nia ĉiĉerono kaj al ĉiuj lokaj amikaj vojaĝgvidantoj, kiuj montris al ni sian mirindan kaj imponan landon.

## Nova servo por EPC-legantoj

La Belga peranto, nome ELDONEJO & LIBREJO SONORILO vzw, Doornstraat 22, B- 2610 Wilrijk, tel. 03/827.24.05. anoncas ke la legantoj de nia revuo El Popola Ĉinio nun povas mendi siajn Esperantajn librojn kaj la revuojn kaj pagi ekde nun per kreditkarto "VISA". Se vi volas pagi per VISA, bv. menci tiu numeron de via VISA kreditkarto. Vi povas pagi ankaŭ je nia konto ĉe UEA: snrl-v, ĉe banko BBL: 320-0342460-23 kaj je nia poŝta ĝirkonto 000-0152140-44.

## Solvoj por "Vegetalaj Enigmoj"

I. maizo II. arakido III. helianto IV. konvolvulo

# Veterana meteologo en la arkta vilaĝo

Teksto de HU YUN

Fotoj de LIU SIGONG

**I**RANTE sur knaranta neĝo, mi atingis lian hejmon. Lia edzino diris al mi, ke li kaptas fiŝojn sur rivero. Kaj mi denove suriris la neĝon profundan ĝis la genuoj kaj venis al la rivero Heilongjiang.

Mi vidis, ke iu silueto moviĝas sur la rivero. Mi pensis, ke ĝi ja estas Zhou Ruqiang, eksestro de Mohe-meteostacio, kaj plenvoĉe kriis: "Maljuna Zhou —". Je mia krio la silueto sin rektigis, malsvingis al mi kaj denove kliniĝis. Mi devis iri al li. Miaj piedoj antaŭenmoviĝis laŭ profundaj spuroj kaj mi atingis lin anhelante.

Tiam Zhou Ruqiang tiris reton el glacitruo per la manoj ruĝiĝintaj de frosto. En maldikaj vestoj li staris sur glacio. Lia vizaĝo ruĝiĝis de frosto kaj liaj brovoj kovriĝis de prujno, tamen li ŝajne tute ne sentis froston. Li forte tiris per la manoj la glacian ŝnuron de la reto. Subite li rimarkis en la reto fiŝon ĉ. 17 cm. longan. Vidante la saltantan fiŝon en la mano, li eksplodis de rido.

Kolektante la fiŝkaptilon, li rakontis al mi la plezuron en fiŝkaptado. Zhou Ruqiang naskiĝis en Guangdong-provinco, Ĉinio. En sia infaneco li ofte mankaptis fiŝojn en lageto de sia hejmvilaĝo. Poste li eklaboris, forlasis la akvolandon kaj fine fiksloĝis en la vilaĝo Mohe, la plej norda parto de

Ĉinio. Tamen, kie ajn li estis, tie li kaptis fiŝojn kaj salikokojn en postlaboraj horoj.

Irante kaj babilante, mi kaj Zhou venis al la meteostacio ĉe la vilaĝo. Li diris al mi, ke li devas labori tuj. Lerte ekfunkciiginte la elektran motoron, li sidiĝis antaŭ aparato kaj komencis telesendi meteorologiajn prognozojn al Pekino. Lia serioza mieno tute malaperigis lian ekscititecon en fiŝkaptado. Li konigis al mi, ke Mohe-meteostacio estas interŝanĝa stacio pri internaciaj meteorologiaj informoj. Oni devas doni al Pekino meteorologiajn informojn en ĉiu tria horo, kaj poste Pekino transsendas ilin al la Azia Meteocentro. Neatendite, en tiel malproksima loko funkcias meteostacio komunikiĝanta kun la mondo.

La meteostacio fondiĝis en 1957, kun nur 4 laborantoj, kaj nun en ĝi laboras 25 homoj. Finita telesendado, Zhou rakontis al mi la laboron en la pasintaj jaroj. Krom telesendi prognozojn al Pekino, la meteostacio ankaŭ antaŭsciigas pri la loka vetero. Laŭ la observitaj prognozoj, la stacio prezentas proponojn pri la vivo kaj produktado al lokaj departementoj. Ekz., iujare ĝi komparis la observitajn prognozojn kun tiuj antaŭaj kaj sciigis, ke la jara temperaturo estos malpli alta ol iam antaŭe. Tial, ĝi proponis al la distrikto multe kultivi tritikon kaj

malmulte aŭ tute ne kultivi sojfabojn. La distrikto ĝustatempe reguligis la proporcion de areo por gren-plantoj kaj per tio garantiis la produktadon. Foje, multaj sciencistoj venis tien por observi plenan eklipson de la suno, sed la suno estis kovrita de nuboj. Ĉu foriri aŭ atendi plu? Laŭ sia sperto akirita en multjara observado Zhou decidis, ke ili atendu plu. Rezulte de tio, ili observis la plenan eklipson de la suno.

Kompreneble, la laboro en la meteostacio estas peniga. Oni estas sufiĉe okupata sole pri meteobservado. Mohe, kiel la arkta vilaĝo de Ĉinio, havas longan kaj frostan vintron. Oni nepre devas persisti en meteobservado unufoje en ĉiu horo, malgraŭ 7-8-gradaj vento, neĝo ĉ. 20 cm. profunda aŭ malvarmo je 40°C sub la nulo. En la 30 jaroj post 1960, kiam Zhou venis al la arkta vilaĝo, li neniam ĉesigis meteobservadon. Nun li ne funkcias kiel staciestro, tamen li ankorau observas veteron kiel kutime. En festotagoj li sola prenas sur sin la laboron, por ke aliaj pasigu feriojn hejme.

La ĉefa tasko de Zhou nun estas kulturi junajn meteologojn. Du junaj deĵorantoj laŭdis, ke ilia instruisto Zhou kapablas klarigi komplikajn aferojn per simplaj vortoj kaj teksti rimitajn formulojn el malfacile memoreblaj aferoj, ke oni facile memoru ilin. Li estas

rigora al si en laboro, sed neniam ripročas aliajn. Se iu plenigas tabelon de donitaĵoj ne bone, Zhou do faras tion denove, por ke li bone plenigu kiun ajn tabelon estonte. Parolante, ili eliris kune kun sia instruisto por fari observadon. Sekvinte ilin en la korton, mi sentis teruran froston, ke miaj manoj estis malvarmaj eĉ en plumaj gantoj, sed ili kun plumo kaj kajero enmane atente notis meteologiajn donitaĵojn. Fininte la laboron, ili revenis en la ĉambron, kun manoj rigidigitaj de frosto.

La hejmo de Zhou troviĝas proksime de la meteostacio. Kiel aliaj vilaĝanoj, li loĝas en ordinara kamparana korto, sed en lia domo kreskas pli da verdaĵoj. Lia edzino estas honesta mezaĝulino. En 1987 Zhou memvole laboris en la Amura Meteostacio 150 km. fore de sia hejmo. Lian malsaneman edzinon trafis cerba embolozo kaj ŝi enhospitaliĝis. Li ne povis ĝustatempe reveni flegi sian edzinon. Eĉ ĝis nun ŝi ankoraŭ ne tute resaniĝis. Li ege bedaŭras tion. Tamen, lia edzino fervore rostis melonsemojn kaj infuzis teon por ni, kvaŝaŭ nenio okazus al ŝi. Ankaŭ ŝi estis meteorologo, sekve ŝi bone komprenas sian edzon, kiu obstine strebas al sia kariero. Zhou fieras ankaŭ pri tio, ke li kulturis sian filinon en daŭriganton de sia kariero. ■



Zhou Ruqiang fiŝkaptas post rompo de glacio.



Meteologiaj prognozoj raportataj al Pekino



Meteostacio sur stepo

## ESP-NOVAĴOJ

● Memore al la 90-jara datreveno de la naskiĝo de la elstara proleta revoluciisto Chen Yi, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis, la 26-an de aŭgusto 1991, 2 poŝtmarkojn. En la sama tago la Ĝenerala Poŝtmarka Kompanio de Ĉinio emisiis memorkoverton kun Esperanta stampo, kiun projektis Chen Zhangping. Ankaŭ la Changshu-a Poŝtmarka Kompa-



Memorkoverto por la 90-jara datreveno de la naskiĝo de Chen Yi

nio uzis samtage Esperantan stampilon faritan de s-ro Zang Linrui.

La 30-an de aŭgusto okazis en Pekino Poem-deklamado memore al la 90-jara datreveno de la naski-



S-ro Abdul Salam (la dua de maldekstre) kaj laborantoj de ĈEL (dekstre) en Pekino

ĝo de Chen Yi. En la kunveno multaj homoj recitis versaĵojn por esprimi sian profundan sopiron al s-ro Chen Yi, marŝalo de la Ĉina Popola Respubliko, poeto kaj intima amiko de la ĉina E-movado. Lia filo Chen Haosu, vicprezidanto

de la Societo "Amikoj de Esperanto", kaj pli ol 200 personoj el diversaj rondoj partoprenis en la kunveno.

● De la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1991, s-ro Abdul Salam, prezidanto de Pakistana E-Asocio venis en Pekinon kaj intervidiĝis kun samideanoj de la Ĉina E-Ligo, redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj E-sekcio de Radio Pekino.

Respondeculoj de la Ĉina E-Ligo kaj redakcio de "El Popola Ĉinio" akceptis s-inon Kikushima Tazuko, faman japanan esperantistinon, kiam ŝi restis en Pekino post vizito de Mongolio, kaj kune kun ŝi vespermangiis la 26-an de aŭgusto 1991.

● La 13-an kaj 14-an de aŭgusto 1991 prof. So Gilsu, estrarano de UEA, vizitis Shenyang, Liaoning-provinco, kaj interparolis kun la tieaj esperantistoj.

● La 7-an kaj 28-an de julio 1991, sinsekve fondiĝis la Handan-a E-Asocio de Hebei-provinco kaj Shaoyang-a E-Instituto de Hunan-provinco, kies prezidantoj estas Ma Qingzhong kaj Li Lanjun respektive.

● Por la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, la Hebei-a E-Asocio funkciigis, ekde la 20-a de julio 1991, parolan E-kurson en someraj ferioj, en kiu lernis 14 kursanoj.

● Yu Jinghui de la Dongguan-a E-Asocio de Guangdong-provinco funkciigis ĉi-jare en lernejo kaligrafian kaj belartan kursojn por geknaboj en someraj ferioj. En la kursoj oni lernis Esperanton duonhoron ĉiutage. Pli ol 20 5.5-13-jaraj geknaboj lernis tie.

● La 14-an de julio Jiading-a Prepara E-Asocio kaj la antaŭurba departemento de la Ŝanhaja E-Asocio okazigis kunvenon memore al la 104-jara datreveno de la publikigo de la Unua Libro kaj inaŭguron de la E-kurso abc. Wang Minhao, prezidanto de la Ŝanhaja E-Asocio, donis la unuan lecionon al la novaj kursanoj.

● La 4-an de aŭgusto 1991, esperantistoj de la urbo Jiangyou,

Sichan-provinco, Li Jiagui, Li Yongsheng k.a. okazigis la unuan dimanĉan volontan konsultiĝon pri Esperanto, sub la aŭspicioj de la rilata departemento de la urbo. Intertempe pli ol 20 gejunuloj montris sian deziron lerni Esperanton.

● En aprilo kaj majo 1990 s-ro Joachim Werdin de Pollando prelegis en la Taiwan-a Nacia Universitato de Taibei pri la Internacia Lingvo. La prelego allogis multajn studentojn. 15 personoj finis sian Esperanto-kurson kaj fondiĝis Taiwan-a Esperanto-Asocio. Li venis al Taiwan denove en 1991 por lernigi Esperanton al pliaj homoj kaj fortigi la agadon de TEA.

● La 28-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos de la 12-a ĝis la 17-a de julio 1992 en la urbo Anapolis proksima al la brazila ĉefurbo. Estos senpage aliĝi al la kongreso por eksterlandanoj. Por pliaj informoj skribu al "Anapolis" Esperanto-klubo, C.P. 399, 75001-Anapolis, Go, Brazilo.

● Sufiĉas sendi poŝtkarton al la redakcio de "Heroldo de Esperanto" (Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (To), Italio), por senpage ricevi ekzempleron de la duobla numero de la gazeto kun ilustrita raporto pri la U.K. en Bergen.

● Por helpi internacian asocion pri protektado de la bestoj kaj de la naturo, petu ekzempleron en Esperanto de la "Deklaracio de la amiketoj de la bestoj", celante traduki ĝin en vian lingvon kaj poste sendi la kopion de la tradukaĵo al tiu landa asocio kaj Blua Mondĉeno, kies adreso estas 39, Rue de Vise, B-1170 Bruselo, Belgio.

● Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj arangos de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1992 la I-an Mondkongreson de Esperantistoj-Handikapuloj en fama banurbo Frantis/kovy lázne/, Ĉeĥoslovakio, kie estas konstruita en la jaro 1914 la unua en la mondo monumento de D-ro L.L. Zamenhof. Limdato: 31.12.1991. Adreso: p.k. 63, 274 01 Slaný, Ĉeĥoslovakio.

# La Heyang-a teatro de tirataj pupoj

Teksto de **JIANG SHANGLI** kaj **SHI YAOZENG**

Fotoj de **WANG SHANGCHUN**

**E**N Heyang-gubernio, Shaanxi-provinco, Ĉinio, estas ludata teatro de tirataj pupoj kun lokaj trajtoj.

Ĝi estas unu el la tradiciaj pup-teatroj de Ĉinio. Kiel antikva teatro en Shaanxi, ĝi havas la saman originon kiel la skulpturo de la dinastioj Sui kaj Tang (518-907). La pupoj kun larĝa frunto, dika mentono kaj longaj brovoj, precipe virinaj figuroj, tre similas al argilaj homfiguroj kaj budhaj statuoj de Tang-dinastio.

Jam en Ming-dinastio (1368-1644) la Heyang-a teatro de tirataj pupoj viglis sur scenejoj. En Xinli-vilaĝo, Dongwang-distrikto de Heyang-gubernio, estis speciala scenejo kun koridoro malsupre. Sur la scenejo vidiĝis malgranda steleo kun ĉizitaj ideogramoj signifantaj "Tie ĉi prezentigas teatro de tirataj pupoj en la printempa kaj aŭtuna festoj por esprimi dankon al Dio." En la lastaj jaroj de Ming-dinastio kaj komencaj jaroj de Qing-dinastio Li Guan, erudiciulo sukcesinta en la provinca ekzameno, kiu estis intima kun artistoj de tirataj pupoj en Heyang, faris gravan reformadon de muziko, melodioj, repertuaro kaj kostumoj de la pupteatro. Dank' al tio la pupteatro perfektigis kaj pli konformas al la teatraj postuloj. De post la regperiodo de la imperiestro Qianlong (1736-1796 sur trono) la Heyang-a teatro de tirataj pupoj atingis sian kulminon de disvolvigo. Sole en Heyang-gubernio

funkciis ĉ. 60 pupteatraj trupoj, kiuj prezentis en multaj lokoj, inkl. de la urboj Suzhou, Yangzhou kaj Pekino.

La kant-melodio de la teatro de la tirataj pupoj estas klara. Oni kantas ĉefe per ploranta tirata voĉo, kiu estas utila por esprimi korpremitecon, indignon kaj malĝojon kaj distingiĝas per patoso kaj emocio. Ankaŭ ĝiaj arioj estas abundaj. Estas pli ol 10 ofte uzataj arioj de kordinstrumentoj, kiuj formigis ĉefe el minoraj popolantoj kun forta loka gusto kaj kamparaodoro. La instrumento piŝjanhu, speciala kordinstrumento de la teatro de tirataj pupoj, donas sonon obtuzan kaj profundan, kaj la tamtamo sonon fluan kaj glatan. Ilia intima kunlaboro kun la kantado de la aktoroj formis apartajn trajtojn de la teatro.

En la Heyang-a teatro la pupoj estas 80-90 cm altaj, inkl. de *ŝeng, dan, ĝing kaj ĉou*. La fadenoj por tiri la pupojn ĝenerale estas bluaj kaj nigraj. En la komencaj jaroj ili estis unu metron longaj. Oni nomas ilin "malaltaj fadenoj". En la lastaj jaroj oni reformis la scenejon kaj la artistoj en alta loko tiras la pupojn, tial la fadenoj fariĝis pli longaj. Oni nomas ilin "altaj fadenoj", kiuj kompreneble malfaciligis la manipuladojn. Sur ĉiu pupo ĝenerale estas 5-7 fadenoj. Pro komplika manipulado la fadenoj devas esti pli multaj. Per fadenoj la artistoj tiras, vibrigas, levas, turnadas kaj svingas la pupojn, por ke ĉi tiuj faru diversajn movojn kaj vi-

zaĝesprimojn. Sur la malgranda scenejo la animitaj pupoj povas fari intiman interparolon kiel geedzoj kaj bravan luktadon kiel sur batalkampoj.

En ĉiuj dinastioj estis talentaj artistoj de la Heyang-a teatro de tirataj pupoj. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio kaj komencaj jaroj de la Respubliko de Ĉinio viglis talenta artisto Wang Wuhan. Li estis lerta en manipulado, kompetenta en reĝisorado kaj kapabla en gvido de prezentado. Oni admiris, ke li ambaŭmane vivigis ĉiujn pupojn kaj kantvoĉe prezentis ĉiujn esprimojn. La modernaj artistoj Yang Gaolang, Liu Shengqing, Wang Xiaoqian, Wang Diwa, Li Yinxuan, Wang Zhongxu, Dang Wenhui kaj Guo Yutang havas ĉiun apartan kapablon en prezentado de la teatro kaj ilia ludo tre interesas la spektantojn. Junaj artistoj Xiao Wangfeng, Wang Hongmin kaj Cao Enxian estis plurfoje premiitaj en la provincaj kaj subprovincaj konkursoj.

La repertuaro de la tradicia Heyang-a teatro de tirataj pupoj estas riĉa kaj temas pri amo, epizodoj kaj juĝaferoj. Oni prezentas pli ol 500 programerojn. Krom la oficialaj estas ankaŭ improvizitaj, kiuj estas humuraj kaj plenaj de vivetoso.

Dank' al siaj antikva stilo, eminenta tradicia arto, originala melodio, forta vivetoso kaj loka gusto, la Heyang-a teatro revigliĝis kaj ricevis admiron kaj ŝaton de la spektantoj. ■



Sceno el teatro de tirataj pupoj

Popolaj artistoj ludas teatron de tirataj pupoj.







Sceno el teatro de tirataj pupoj

Pupo por la teatro



Dang Wenhui, estro de la Trupo de Teatro de Tirataj Pupoj de Heyang-gubernio



# Refoja vojaĝo en Hulun Bujr

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LIU SIGONG

**A**NTAŬ 5 jaroj neforgeseblan impreson donis al mi la senlima stepo Hulun Bujr, la prospera arbaro de la Granda Xing'an-montaro, la blua Daji-lago kaj la gastamaj paŝtistoj en la Interna Mongolio de norda Ĉinio. La artikolo "Vojaĝo en Hulun Bujr" en la revuo EL Popola Ĉinio, n-roj 1 kaj 2, 1987, ja raportas pri mia vojaĝo.

Ĉi-somere mi refoje vojaĝis tien por partopreni la solenan sportkunvenon Nadamo de la diversnaciaj popolanoj sur la vasta stepo. Kaj la granda ŝanĝiĝo de Hulun Bujr tuj gravuriĝis en mian memoron.

## NOVA FIZIONOMIO DE LA STEPO

Frumatene en la stepo, banata de sunlumo kaj lavita de pluvo, la aero estis freŝa. Proksimume 100 000 homoj kolektiĝis en la sportkunvenejo kaj kun ĝojo atendis la solenan inaŭguron.

La kunvenejo estis sur ebena herbaro. Sur la tegmento de la podio arĝente brilis 3 ornamaĵoj similaj al mongolaj jurtoj, kiuj montras la naciajn trajtojn de la stepo. En kaj ekster la kunvenejo flirtis koloraj flagoj kaj ŝvebis balonoj. Ĉie regis festa atmosfero. Je la 9-a matene ektondris saluta kanonado, ekflugis kurierkolomboj. Oni tondre aplaŭdis, kiam la paradantoj eniris en la kunvenejon.

Mongoloj estas ĉefaj loĝantoj en Hulun Bujr. Historiaj materialoj konigas, ke Hulun Bujr estas lulilo de la mongola nacio. Jam antaŭ 1 000 jaroj iliaj prapatroj loĝis tie. Nun la artistaj trupoj dancante eniris en la kunvenejon. Dauroj, ev-

enkioj kaj oroĉenoj vivas speciale en Hulun Bujr. Iliaj dancoj montris la ĉasistan vivon, ilian saĝon kaj forton.

Eniris en la placon ankaŭ *jangedancantoj*, stilz-irantoj, dancigantoj de drakoj kaj leonoj, luktistoj kaj arkopafistoj... Laste venis ĉeval-rajdistoj. Centoj da rajdistoj kun ĉevaloj en bonorda trupo marŝis kiel unu homo, kio spegulis la krudecon kaj bravecon de la mongoloj, nacioj sur la dorso de ĉevalo.

## BRAVAJ AGLOJ SUR LA STEPO

La bravaj luktistoj dancis aglan dancon, kvazaŭ bravaj agloj flugus en la konkursejon. Lukto estas unu el la ĉefaj sportoj de Nadamo. Aspektis kiel antikvaj militistoj la luktistoj en veŝto el plurtavola tolo kun kupraj kaj arĝentaj butonoj kaj rondaj ornamaĵoj sur la dorso, en loza pantalono, silka zono kaj botoj. En Hulun Bujr viglas multaj elstaraj luktistoj, inter kiuj troviĝas

sportaj eminentuloj kaj tutlandaj ĉampionoj.

Virina lukto estas nova sporto-branĉo. Oni enlistigis ĝin en la oficialan konkurson nur antaŭ 5 jaroj. Nun la virina luktarto jam maturiĝis kaj en la konkurso ofte vidiĝis interesa spektaklo.

Vetkuro de ĉevaloj estas la plej alloga en Nadamo. Sur la stepo oni surĉevaligas geknabojn malpli-ol-6-jarajn, kiuj imitante plenkreskulojn rajdas sur ĉevalo, kaj tial la konkursantoj plejparte estis 8-9-jaraj aŭ iom pli aĝaj geknaboj. Junaj rajdistoj surĉevaliĝis kaj la gepatroj senĉese donis konsilojn apude. En la okuloj de la loĝantoj la vetkuro de ĉevaloj estas ne nur konkurso inter la rajdistoj, sed ankaŭ montras la nivelon de iliaj gepatroj kaj trejnistoj. La venko ofte portas gloron al la tuta vilaĝo.

Kun pafado de startopistolo 6 konkursantoj sagrapide pafiĝis antaŭen. Sur la ludkampo tuj aŭdiĝis mongola kanto pri ĉevaloj. Kriado de la apudstarantaj paŝtistoj kura-

Rajdantoj sur ĉevaloj



ĝigis la rajdistojn.

## VIGLA KOMERCA STRATO

Sude de la ludkampo estas jur-taro kun pli ol 500 standoj. Tie vendiĝas 8 000 specoj da varoj. Tio estis senprecedenca en la komerca historio de Hulun Bujr.

Sur la homoplena strato okul-frapaj estis la paŝtistoj rajdantaj sur ĉevaloj aŭ kondukantaj kame-lojn. Flarinte la bonodoron de lak-toteo kaj kuirita ŝafaĵo, ili deĉeva-ligis. Liginte la ĉevalon al paliso apud jurto, ili senĝene eniris tien. Satiĝinte, ili denove surĉevaligis kaj daŭrigis sian viziton. Tiaj sen-ĝenaj paŝtistoj ne vidiĝas en Pe-kino.

La komerca strato estas fenestro de Hulun Bujr. La abundaj varoj kaj konkura aĉetado de la tieaj lo-ĝantoj montris, ke tie la komercaĵa ekonomio havis grandan disvolvi-ĝon.

Antaŭ 5 jaroj, kiam mi unuafoje vizitis Hulun Bujr, ĝia ekonomia konstruado ĵus komenciĝis, tamen ĉiuj entreprenoj, kiujn mi vizitis, servis al la produktado kaj vivo de la paŝtistoj. Antaŭ 3 jaroj la ŝtato ekprenis Hulun Bujr kiel eksperimen-tan regionon por ekonomia re-formado kaj dank' al tio la ekon-omia konstruado de Hulun Bujr rapide disvolviĝis kaj aperis aro da entreprenoj por eksportado. La ste-po malfermis sian pardonon al la tuta mondo.

Estas menciinde, ke Hulun Bujr kolektis 87 milionojn da juanoj (5.4 juanoj egalas al unu usona dolaro) por la energia, trafika kaj tele-komunika konstruado, tiel ke oni bonigis la medion de investado. Ankaŭ la abundaj riĉfontoj kaj avantaĝa geografia situo estas uti-laj por altiri talentajn personojn kaj investantojn.

Nun Hulun Bujr havas 4 komer-cajn havenojn, kiel Manzhouli kaj Heishantou, kaj unu eksport-importejon. Ĝi estas ĉefa loko por komercado de Ĉinio kun Sovetunio kaj Mongolio. Nun Hulun Bujr ek-sportas ĉefe bovajon, vestojn, hejmajn elektrajn aparatojn kaj al-iajn objektojn. Nun pli ol 100 spe-

coj de ĝiaj varoj estas avangardaj en nia lando kaj iuj aliaj atingis la internacian nivelon. La sportistaj vestoj kun marko "Toreadoro" pro-duktaĵoj de la Dekstra Gubernio Ergune estas multe ŝatataj de klie-ntoj. Estas ŝatataj en la merkato an-kaŭ plumaj vestoj produktitaj de Zhalantun kaj minerala akvo kun marko "Dia Monto" produktita de la Oroĉena Aŭtonoma Gubernio.

Dum la sportkunveno venis 130 komercistaj grupoj, inkl. tiujn de Sovetunio, Mongolio, Japanio, Ko-reio, Usono, Kanado kaj Hong-kong. La mastroj de Hulun Bujr intertraktis kun ili kaj subskribis komercajn kontraktojn je pli ol 400 milionoj da svisaj frankoj.

## VASTA PERSPEKTIVO

La ĉi-foja vizito konigis al mi, ke la 10-jara reformado kaj 3-jara konstruado en la eksperimenta re-giono rapide disvolvis ĉiujn aferojn de Hulun Bujr. En la fino de 1990 la totala nacia produktovalorado de Hulun Bujr atingis 4.4 miliardojn da juanoj kaj ĝia nacia enspezo — 3.66 miliardojn da juanoj. Nun tie jam formiĝis naci-industria sistemo kun arbara industrio, karba indus-trio kaj prilaboro de brutaj produk-taĵoj kiel la ĉefa parto.

La Laktaĵa Fabriko de Hajlar fondiĝis en 1950. Mi vizitis ĝin an-taŭ 5 jaroj. Tiam ĝi ĵus finis sian kompletigon kaj akiris la kapablon prilabori ĉiutage 300 tunojn da fre-ŝa lakto. Nun ĝi estas unu el la plej grandaj laktaĵaj fabrikoj en Ĉinio. Poste ĝi importis el eksterlande in-stalaĵon por kontroli la kvaliton de la produktaĵoj. La fabriko akiris oran medalon de kvalito de la lan-do pro sia kazeino kaj arĝentajn medalojn pro siaj butero kaj oficin-ala laktozo. En 1990 ĝia profito atingis 2.05 milionojn da juanoj, preskaŭ 2-oble kiom tiu antaŭ 5 jaroj.

La Hajlara Fabriko de Terpo-maĵoj estas la unua ĉina fabriko de terpoma faruno. Ĝi estas ankaŭ en-trepreno por prilabori terpomojn per Nederlandaj tekniko kaj insta-laĵoj kun la nivelo de 80-aj jaroj. En la inaŭguro de la fabriko la

fabrikestro, s-ro Shen Hegong, diris al mi, ke la nigra sablotero de Haj-lar estas utila por kreskado de ter-pomoj. La jara terpoma produktok-vanto de Hajlar estas 70 000 tunoj. Lia fabriko povas prilabori 35 000 tunojn da terpomoj ĉiujare kaj fa-runigi 4 600 tunojn. Ĝiaj produkta-ĵoj riĉigas la enlandan merkaton kaj eksportiĝas al Nederlando.

S-ro Shen konigis al mi ankaŭ, ke el la terpoma faruno oni povas fari diversspecajn supojn, pas-tojn, frititajn mangaĵojn, fridigi-tajn mangaĵojn kaj diversspecajn rapidmangaĵojn. Sur la komerca strato de Nadamo ja vendiĝas ter-pomaj strioj tuj frititaj de la fabri-ko, similaj al la francaj.

S-ro Shen diris, ke la fabriko subskribis kontrakton kun la Limi-gitaj Kompanioj Kentucky de Pek-ino kaj Ŝanhajo kaj la Pekina Avida Limigita Mangaĵ-provizkompanio pri longatempa provizado de siaj produktaĵoj. Ĝiaj produktaĵoj interesas ankaŭ Sove-tunion kaj Sudorientan Azion.

Nun la tieaj loĝantoj zorgas pri la daŭra disvolviĝo en la estonteco. Oni bone scias, ke kvankam Hulun Bujr estas abunda je riĉfontoj, ta-men al ĝi mankas talentuloj, tekni-ko kaj monrimedoj. Ĝuste por solvi tiujn malfacilojn, Hulun Bujr far-as kunlaboron kun aliaj lokoj kun kompare forta ekonomia bazo, kaj surbaze de reciproka subteno, reci-proka utilo, egaleco kaj kunlaboro ili disvolvas ekonomion kaj tekni-kan kunlaboron por la kuna pros-periĝo.

En la sportkunveno Hulun Bujr subskribis kun Pekino, Weifang de Shandong-provinco kaj Wuhan de Hubei-provinco interkonsentojn pri ekonomia kunlaboro. Dum multaj jaroj Pekino helpis Hulun Bujr per monrimedoj, tekniko kaj talentuloj. Ĉi-foje oni decidis, ke en la venontaj 3 jaroj Pekino pruntos al Hulun Bujr 15 milionojn da ju-anoj kaj la lasta liveros al Pekino sojfabon kaj sojfaban rekrementon.

En la sportkunveno oni facile trovis, ke la ekonomio de Hulun Bujr disvolviĝas stabile. ■




Popolaj artistoj en la sportkunveno

Knabinoj en la sportkunveno



Ĉeval-konkurso





Al Nadamo

En konkurso de lukto



# Familia Sportkunveno

**E**STIS frosta tago de vintro. Tamen varmo kaj ĝojo regis en tenisluda domo en Pekino, kie okazis originala familia sportkunveno.

## “ENBUSIĜO”

En Ĉinio ofte videblas la fenomeno de interpuŝiĝo por enbusiĝo. Nun la ludo ŝajne estis ekzameno de la sportigita povo por enbusiĝo. La konkursa regulo difinis, ke je ekfajfo fare de juĝanto ĉiuj familioj devas ascendi la rondan ŝtipon kun diametro de duonmetro kaj oblongan lignan tabulon, resti tie por kvin sekundoj kaj poste kuras antaŭen. Tiu, kiu falas de sur la ŝtipo aŭ tabulo en kvin sekundoj, estas juĝita kiel malsukcesinto.

Venis Liu Jiang, veterana filma aktoro kun siaj kvar familianoj. Li

memfide konigis al alia konkursanto sian sperton, ke la lasta kapjesadis senĉese.

Kiel atendite, Liu Jiang estis lerta konkursanto. Kvankam dika, li moviĝis rapide. Je ekfajfo li kun siaj edzino, filo, bofilino kaj malgranda nepo harmonie suriris la “aŭtobuson” kaj sukcese kuratingis la finon, kio vekis varman aplaudadon de la rigardantoj. Oni laŭdis, ke la familio de la aktoro estas kompetenta en sporto.

Jes, ĉiuj familianoj de Liu Jiang ŝatis sporton. Lia edzino ofte ludis tablotenison, eĉ gajnis la ĉampionecon en bicikla konkurso siatempe. Lia pliaĝa filo estis membro de la korbopilka teamo de sia unuo kaj lia juna filo piedpilk-luda amatoro. Liu Jiang estis ne nur pilkoŝatanto, sed ankaŭ triaklasa juĝisto de korbopilka ludo. Emeritiĝinte,

li ofte faris promenadon kaj bicikladon. Kompreneble, li ankaŭ lertis en tiu ĉi ludo.

## TRAIRO DE “TEMPA TUNELO”

Komenciĝis la konkurso trairi “tempan tunelon”. Laŭ la regulo la konkursantoj de ĉiuj familioj venis al startpunkto, rapide vestis sin per lanugovestoj modaj en la naŭdekaj jaroj kaj mano en mano kuris antaŭen. Atinginte la linion kun marko de la tridekaj jaroj, ili rapide ŝanĝis la vestojn per ĉinaj tradiciaj roboj kaj jakoj kaj daŭrigis sian kuradon antaŭen. Kiam ili atingis la linion kun marko de Qingdinastio (1644-1911), ili ŝanĝis siajn vestojn per mandarenaj ĉapoj kaj silkaj broditaj vestoj Qingstilaj. Nur ĉ. unu minuton la konkursantoj transpasis kelkajn jarcentojn.

En la konkurso “Enbusiĝo”



En pilkoludo



Li Wanfen, fama aktorino de dialoga dramo, lerte sin movadis kiel ŝi aktorin sur scenejo, kvankam ŝi estis iom korpulenta. Ŝia familio gajnis la ĉampionecon de la konkurso de speciale invititaj, tri-generaciaj kaj kvin-membraj grupoj.

“En la junaĝo, mi ŝatis preskaŭ ĉiujn sportojn”, Li Wanfen diris al mi kun kontento post la konkurso, “kvankam nun mi ne povas partopreni la drastan sporton, tamen mi ofte faras volanludon kaj min ekzercas per ĉigongo. Vivo ne povas esti sen sportoj.”

Dum la konkurso, speciale interesa estis tio, ke la familio de piloto Chen Youcai ofte malobservis la regulon pro konfuziĝo. Lia bofilino haste mismetis sur sin viran jakon, ŝia edzo virinan broditan robon kaj forgesis porti la ĉapon. La familio perdis la ŝancon gajni la premion kaj estigis rideksplodon de la rigardantoj.

#### “RENDEVUO SUR PIGPONTO”

La bela rakonto pri rendezvuo de Bovisto (Altairo) kaj Teksistino (Vego) en vespero de la sepa de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas populara por ĉinoj, tamen la konkurso de “Rendezvuo sur Pigponto” kun sporta gusto estis

aparte amuza. Sur la konkursejo kuŝas ponto formita de longa tabulo kun du rondaj ŝtipoj ĉe la du finoj kiel pilieroj. La konkursa regulo difinis, ke geedza paro iras renkonte de la du pilieroj al la mezo de la ponto. Renkontiĝinte, ili devas iri plu al la kontraŭa piliero, sen fali de sur la ponto.

Jen ekfajfo, paro da geedzoj memfide ekiris renkonte sur la ponton. Ne atendite, la geedzoj falis de sur la ponto je la renkontiĝo. Ili malsukcesis. Ĉu ne ekzistis amo inter ili? Ne, la kaŭzo kuŝis en tio, ke mankis al ili fizika ekzercado, tial ili ne povis teni sin en ekvilibro, preterpasante unu la alian dum la renkontiĝo. La alia paro, laboristo Wang Yong kaj lia edzino Liu Wei, glate trapaŝis la ponton, kio vekis varman aplaŭdodon.

Tre viglaj estis la sportaj aktivecoj de la fabriko, kie laboras Wang Yong kaj Liu Wei. Tiu paro ofte partoprenis en sportoj kaj ŝatis danci. Jen pro kio ili sukcesis.

#### “KRABA VETKURO”


Kvankam krabo sin movas per siaj ok piedoj, tamen ĝian iradon gvidas unu cerbo, tial ĝi movas siajn piedojn harmonie. Sed la “kraba vetkuro” estis tute alia. La konkursa regulo postulis, ke la kvin membroj de tri-generacia

familio sidu sur ŝtupo kun radoj kaj kune movu la piedojn por atingi la celokon. Estis malfacile harmoniigi la movojn de dek piedoj, kiujn gvidis kvin cerboj. Komenciĝis la konkurso, kvankam tre penadis iuj familioj, tamen iliaj ŝtipoj zigzage iris, jen dekstren, jen maldekstren, pro la neharmoniaj agoj, kio de tempo al tempo eksplodigis ridojn ĉe la rigardantoj. La familio de ĵurnalisto Zhang Xiaozhu harmonie rulis la ŝtipon antaŭen. Ili sukcese atingis la celokon kaj gajnis la ĉampionecon.

La familianoj de Zhang Xiaozhu ŝatis sportojn. Liaj emeritiĝintaj gepatroj ofte biciklis kaj montgrimpis. Lia edzino ofte ludis tablotenison. Zhang Xiaozhu ŝatis ludi korbopilkon, flugpilkon kaj tablotenison kaj montgrimpi. Ankaŭ lia infano ŝatis sporton, influate de la familio. La kvin membroj de lia tri-generacia familio harmonie penadis kaj gajnis la ĉampionecon.

Nemankigebla estas sporto por la nuna vivo kaj la familia sporto jam fariĝas nova grava parto de la sportoj de la popolamasoj. Kun kresko de koncepto de partopreno pli kaj pli multe da familioj ŝatas sportojn. ■

En la konkurso de irado



# Kaŭĉuka plantejo en sudokcidenta Ĉinio

Teksto de **DENG CONGFU**

Fotoj de **SHAO YU**




Kaŭĉuka arbaro

Granda kaŭĉuka plantejo







Por ricevi sukon de kaŭĉuka arbo



Kulturado de kaŭĉukaj arboj

En prilaborejo de kaŭĉuko



**E**N la plej suda parto de Yunnan-provinco de sudokcidenta Ĉinio kuŝas ĉarma loko Xishuangbanna. Tie ĉiam regas milda klimato kiel printempe. La dua bazloko de natura kaŭĉuko de Ĉinio sin trovas en Xishuangbanna, kiu apartenas al la subtropika zono.

Xishuangbanna estas ĉiam verde vestita. En la kaŭĉuka bazloko mi intervjuis talentulinon Liu Yunguan, estrinon de la terekspluata subburoo. Ŝi estas honesta, afabla kaj parolema. Mi informiĝis de ŝi, ke la kaŭĉuka plantejo disvolviĝis de nulo kaj nun havas la aĝon de 35 jaroj.

Meze de la 50-aj jaroj nombro da en- kaj eksterprovincaj junuloj venis en Xishuangbanna kaj ekfunkciigis la unuan ŝtatan kultivejon Liming en la loko. Dank' al tio vigliĝis la loko. En la komenca tempo post la ekfunkcio de la kultivejo la laborantoj dronis en malfaciloj.


La dajoj, kiuj loĝas en Xishuangbanna de multaj generacioj, varme bonvenigis la terekspluatantojn. Ili regalis la lastajn per bongusta rizaĵo, vino kaj rostita viando, donis al ili laborilojn, helpis ilin en domkonstruado kaj esplorado. Jen komenciĝis la konstruado de la bazloko de natura kaŭĉuko en Xishuangbanna.

Rememorante la pasintajn, ŝi ne povis sin deteni de emociiĝo, "Estis ĝuste tiuj gejunuloj, kiuj per ŝovelilo kaj ŝpato ekspluatis teron kaj plantis kaŭĉukarbojn, dank' al kio disvolviĝis la kultivejo en la nunan kaŭĉukan plantejon. Por ĝi iuj eĉ oferis sian vivon."

Liu Yunguan aĝas 48 jarojn. En 1965 ŝi diplomitiĝis el la Sudĉinia Instituto de Tropikaj Plantoj kaj eklaboris en Xishuangbanna, kiam la konstruado de la kultivejo iris en la primara periodo. Ŝi laboris kiel teknikistino multajn jarojn kaj akumulis riĉan sperton. En 1983 ŝi ekfunkciis kiel vicestro de la kultivejo. Kelkajn jarojn poste, ŝi estis promociita vicestro kaj estro de la subburoo. Ŝi alprenis serion da reformaj praktikoj, stabile disvolvis la ekonomion de la kultivejo kaj plimultigis la produktokvanton de kaŭĉuko jaro post jaro. Nun la kultivejo havas sub si 10 ŝtatajn kultivejojn kaj unu industrikomercan kompanion, en kiuj laboras 75 000 homoj. La kaŭĉuka plantejo kovras ĉ. 50 000 hektarojn da tero, el kiuj ĉ. 38 000 hektaroj da tero estas kulturataj kaj ĉiujare ili donas 50 124 tunojn da seka kaŭĉuko. Laŭ takso, en la lasta periodo de la Oka Kvinjara Plano de Ĉinio la produktokvanto de kaŭĉuko de la kultivejo atingos 68 000 tunojn.

#### Rikolto





En eksperimentejoj

En pli ol 10 jaroj post kiam ekpraktikiĝis la politiko de reformo kaj pordomalfermo, multe disvolviĝis la produktado de la kaŭĉuka plantejo. Sole la produktokvanto de kaŭĉuko 5-oble pli multe kreskis ol tiu de 1978, kiam produktiĝis 9 444 tunoj da kaŭĉuko. La sukceso ŝuldiĝis ĉefe al la vasta aplikado de sciencaj fruktoj. Liu Yunguan donas apartan atenton al sciencoj kaj teknikoj. Ŝi starigis scienc-teknikan reton kaj praktikas laŭkontraktan sistemon pri scienc-teknikaj laboroj por kombini teknikon kun produktado kaj sciencon kun administrado, kio rikoltis rimarkindan profiton. Ekde 1987 teknikistoj kaj laboristoj kune faris "sintezan eksperimenton pri alta produktivo de kaŭĉkarbo" sur kaŭĉuka plantejo kun areo de ĉ. 1 300 hektaroj, ke la kaŭĉuka plantejo donas grandan kvanton da kaŭĉuko. La hektara produktokvanto de kaŭĉukaj plantejoj de la kultivejoj Jinghong kaj Dongfeng kaj tiu de parto de kaŭĉukaj plantejoj de la kultivejoj Liming kaj Mengla

superis 1 500 kg kaj ilia peca produktokvanto atingis 5.3 kg. La kultivejoj enviciĝas inter la antaŭirantoj de la mondo tiuflanke. Kaj per tio en 1989 Xishuangbanna ricevis la unuan premion "Plano de rikolto" donitan de la Agrikultura, Brutobreda kaj Fiŝkapta Ministerio de Ĉinio kaj la unuan scienc-teknikan premion donitan de la Terekspluata Buroo de Yunnan-provinco.

Antaŭe fakuloj opiniis, ke kaŭĉukarboj ne kreskas en la regiono norde de 17°N, tamen Xishuangbanna (21°-23°N) fariĝis bazo de natura kaŭĉuko de nia lando, kio estas miraklo de penado de pluraj generacioj.

Li Sanhai, emerito kaj ekstero de la kultivejo Mengla, estas bone konata eksperto pri plantado de kaŭĉukarboj. En la komenca tempo de la 60-aj jaroj li venis en Xishuangbanna. Li laboris super plantologio de kaŭĉukarboj kaj modeste lernis de aliaj, kio faris lin eksperto. De 1962 ĝis 1966, gvidate de li, 200 laborantoj priplantis 270 hektarojn per kaŭĉkarboj. En Xishuangbanna ja laboras multaj homoj, kia Li Sanhai.

Je mencio pri la kaŭĉuka plantejo en Xishuangbanna, ŝi diris, ke Hainan-insulo de Ĉinio produktas kaŭĉukon plej frue, kaj iom poste, Xishuangbanna, tial tiu ĉi ricevis la nomon dua bazloko de natura kaŭĉuko. La skalo de kaŭĉuka plantejo kaj produktokvanto de seka kaŭĉuko de Xishuangbanna estas malpli grandaj ol tiuj de Hainan-insulo, tamen la lokon neniam atakas tajfuno. La hektara kaj peca produktokvantoj de kaŭĉuko de Xishuangbanna estas pli altaj ol tiuj de Hainan-insulo kaj okupas avangardan lokon en la mondo.

De multaj jaroj la kaŭĉuka plantejo de la loko stabile disvolviĝas, kaj samtempe per siaj homfortoj, materialoj, financo kaj tekniko ĝi helpas la tieajn nacimalplimultanojn en ilia kultivado de kaŭĉukarboj. Nun tie la areo de privataj kaŭĉukaj plantejoj estas 36 000 hektaroj, kaj kun aldono de la ŝtataj, oni tie kultivas sume 87 000 hektarojn da kaŭĉukarboj. El tio videblas bona perspektivo de la kultivado. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Trafo:** Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\*Lena Kuzmina, 12-j. knabino, dez. kor., interesiĝas pri kalendarretoj, bildkartoj, glumarkoj kaj fotoj. Adr.: ul. Krasnodarskaja

13-77, ul. Krasnojarsk 660005, USSR.

\*Natalia Vorobjenko, 12-j. knabino, dez.kor., interesiĝas pri kalendarretoj, maĉgumetoj, bildkartoj, glumarkoj kaj muziko. Adr.: pr. Komsomolskij 1A-25, Krasnojarsk 660118, USSR.

\*Olga Sventickaja, 14-j. knabino, dez. kor., interesiĝas pri kalendarretoj, fotoj pri filmaktoroj, moderna muziko. Adr.: Per. Vuzovskij 18-28, Krasnojarsk 660025, USSR.

\*Tatjana Titareva, 16-j. knabi-

no, dez. kor., interesiĝas pri kalendarretoj, moderna muziko, horoskopoj, kudrado de vestoj kaj teatro. Adr.: ul. Vavilova 39A-38, Krasnojarsk 660025, USSR.

\*Maria Luĉaninova, 15-j. knabino, dez. kor., interesiĝas pri bildkartoj, besto, biologio, hundoj, moderna muziko. Adr.: ul. Semafornaja 353-8, Krasnojarsk 660025, USSR.

\*18-20 jaraj kursanoj volas kor. tm . Sendu al: E-kurso, Anhui Fang Zhi Gong Ye Xue Xiao, He-fei, Anhui, 230051 Ĉinio.



### Printempaj kaj aŭtunaj vestoj

Foto de LI GUANGRONG

La vesto-kompleto estas projektita de vesto-projektistino Liu Yaping, kiu laboras en la Ĉina Centro de Vesta Projektaĉdo. Ĝi okulfrapas per koloroj. La supra vesto kun duobla brusto portas tradiciajn trajtojn de ĉinaj vestoj. La vesto estas kunprem-ita ĉe la talio, kio reliefigas la belecon de virina figuro.

### REFORMADO DE LA SISTEMO PRI DOMLUADO

La nuna reformado de la sistemo pri domluado en Ĉinio celas solvi la problemon pri manko de loĝdomoj kaj nuligi malraciajn fenomenojn en distribuado de loĝdomoj. Lupago por loĝdomo de Ĉinio estas ege malalta en la mondo, ke la monata minimuma lupago por unu kvadrata metro estas nur 3-4 fennoj (ĉina monunuoj. Unu feno egalas al centono de juano) kaj la maksimuma — 20 fennoj (ĉ. 4 usonaj cendoj).

La malalta lupago por loĝdomo eĉ ne povas kovri trionon de la pago por administrado kaj riparado de la domo, sekve la ŝtato devas asigni 6 miliardojn da juanoj ĉiujare por subvencii la luantojn, kio ege malhelpas konstrui novajn loĝdomojn.

Statistiko raportas, ke 550 000 familioj de la urboj loĝas en malvastaj domoj kaj la pokapa loĝareo estas malpli ol 2 kvadrataj metroj, dum iuj urbanaj loĝas en vastaj domoj provizitaj super difinitaj normoj. Jam nepre necesas reformi la sistemon, kaj fakuloj opinias, ke nun prezentigas la plej bona ŝanco fari la reformadon.

Dank' al la 10-jara reformado kaj pordomalfermo, rapide kreskis la ŝparita kaso de la popolo, kaj tiu ĉi posedas monsumojn ŝparlokitan, uzitan por aĉeti obligaciojn kaj neuzatan, sume 800 miliardojn da juanoj. Por kio tiom da mono? La merkatoj de televidiloj, fridujoj, lavmaŝinoj k.a. malprosperas kaj nun loĝdomoj havas plej grandan altiron.

Meze de la 80-aj jaroj, iuj mez- kaj malgrandaj urboj de Ĉinio ekprovis tian reformadon, kaj nun ĝi alfrontas la duan tajdon.

Ŝanhajo nun faras ampleksan reformadon de la sistemo pri domluado. La 1-an de majo 1991 ekvalidis rimedoj plialtigi lupagon kaj doni subvencion, difini favoran prezon por domaĉeto ktp. Se tiel, do en la venontaj 5-10 jaroj espereble solviĝos la problemoj pri distribuado de loĝdomoj.

La urbetoj kaj gubernioj apartenantaj al Pekino la unuaj faros reformadon de la sistemo pri domluado, kaj la sperto estos disvastigita en la tuta Pekino.

Koncerna departemento de Guangdong-provinco ordonis siajn 19 urbojn ellabori projekton pri la reformado de la sistemo pri domluado ĝis la fino de 1992, kaj ĉiuj gubernioj de la provinco sekvos la antaŭirantojn.

La ŝtato postulis de ĉ. 400 urboj fari tian reformadon ampleksan aŭ partan.

### AKVARIOJ FURORAS EN KANTONO

Nun en Kantono multaj familioj havas akvarion. Kiel miniatura maro, la akvario donas kvietecon al la medio, en kiu regas urba kaoso.

La akvario prezentas bluan mondon, sur la fundo estas multkolora dometo, antaŭ kiu turniĝas ventrado. Senĉese leviĝas brilaj veziketoj, la bela sireno ridetas en konkono, kiu jen fermas, jen malfermas sin, petola anĝelfiŝo flugas en la akvo kaj skafandristo de tempo al tempo levas la fotilon. La plastaj figuroj, ventrado, koloraj lampetoj kaj pejzaĝa fono multe plezurigas la familianojn.

En nokto la akvario estas ore prilumata. Orfiŝoj briletas kiel steloj. Estas granda plezuro ĝui la akvarion en libera tempo.

La posedantoj de akvarioj ofte vizitas bazaron de akvobestoj. La akvobesta merkato de Kantono liveras pli ol cent specojn da fiŝetoj en malsamaj prezoj. Tio montras, ke kantonanoj interesiĝas pri alta spirita vivo.

### INUNDOJ EN LA HISTORIO DE ĈINIO

Historiaj libroj notis, ke en la 2 155 jaroj de 206 a.K. ĝis 1949, en kiu fondiĝis la nova Ĉinio, okazis 1 029 grandaj inundoj, preskaŭ po unu fojo por du jaroj.

En 1931 eksterordinara inundo katastrofis 16 provincojn, el kiuj la provincoj Anhui, Jiangxi, Jiangsu, Hubei kaj Hunan estis la plej serioze inunditaj, kaj Shandong, Hebei kaj Zhejiang iomete malpli. 9.45 milionoj da hektaroj da agroj, nome pli ol kvarono de la agroj de la 8 provincoj, estis inunditaj, duono de la domoj estis ruinigita kaj duono de la loĝantoj formigris. Krome, la inundon akompanis ankaŭ aliaj naturaj katastrofoj kaj leviĝis sociaj tumultoj, ke cent milionoj da ĉinoj estis plagitaj kaj 3.7 milionoj el ili pereis.

La Flava Rivero, rigardata kiel la patrino de la ĉina nacio, katastrofis pli serioze ol Yangzrivero. En la historio la Flava Rivero inundis 1 500 fojojn, po unu fojo por tri jaroj, kaj en po cent jaroj la rivero ŝanĝis sian fluejon. La inundo de la Flava Rivero en la jaro 1117 pereigis milionon da ĉinoj kaj ĝi breĉiĝis en 1642, ke 340 000 el la 370 000 homoj de la urbo Kaifeng estis pereigitaj. En 1933 la Flava Rivero breĉiĝis en 62 lokoj. En 1938 oni intence breĉis la digon de la rivero ĉe Huayuankou kaj 12.5 milionoj da homoj estis katastrofitaj.

En 1954 okazis serioza inundo, kaj pereis duono de la 16 milionoj da hektaroj da inunditaj agroj. La ŝtato helpis katastrofitajn lokojn per monsumo egala al 60 milionoj da usonaj dolaroj.

# Plej bonaj produktaĵoj al klientoj

—Intervjuo kun ĉef- kaj vicĉefdirektoroj de la Pekina Erma Limigita Kompanio de Medicinaj Instrumentoj

**P**OST kiam Ĉinio ekpraktikis en 1979 la politikon de reformado kaj por-domalfermo, aperis unu post alia en la lando grandaj kaj malgrandaj ĉinaj-alilandaj entreprenoj. Inter ili troviĝas la Pekina Erma Limigita Kompanio de Medicinaj Instrumentoj establita de ĉinoj kaj japanoj. Sinjoro Ozawa Masanao de Japanio funkcias kiel ĝia ĉefdirektoro kaj sinjoro Huang Shiguang de Ĉinio kiel ĝia vicĉefdirektoro.

S-ro Ozawa, 50-jara, nealta kaj simple vestita, estis serena kaj parolema, kaj s-ro Huang, 48-jara, mezastatura kaj neesprimema, parolis malmulte, sed sprite.

Kiel kunlaboras ĉinoj kaj alilandanoj en tiaj entreprenoj? Kiel ili mastrumas siajn entreprenojn? Kun tiuj demandoj mi intervjuis la du direktorojn. Sube estas nia interparolo:

Sun(raportisto): S-ro ĉefdirektoro, kio intencigis al vi starigi tiun ĉi kompanion siatempe?

Ozawa: Antaŭ la fondo de la kompanio ni japanoj jam havis multjarajn komercajn rilatojn kun la Pekina Fabriko de Biokemiaj Instrumentoj. Ni eksportis al ĝi en la komenco instrumentojn kaj poste instrumentajn pecojn. Ni respondecis pri tekniko en produktado de tiuj precizaj instrumentoj. Tamen tiaj komercaj rilatoj jam ne

povis kontentigi la postulojn de ambaŭ flankoj. Ni do interkonsiligis kun ĉinoj pri fondo de la kompanio. Kompreneble ni fondis tiun ĉi kompanion ĉefe por doni teknikan helpon al Ĉinio kaj liveri plej bonajn medicinajn instrumentojn al ĉinaj klientoj.

Sun: Kiel fondiĝis la kompanio?

Ozawa: Ĝi fondiĝis aŭguste de 1988 sub la helpo de la Ŝtata Medikamenta Buroo de Ĉinio kaj aliaj koncernaj departementoj.

Sun: Vi diris, ke vi volas liveri plej bonajn medicinajn instrumentojn al ĉinaj klientoj. Kiujn instrumentojn do vi produktas?

Ozawa: Ni fabrikas multajn specojn de produktaĵoj, inter kiuj estas medicinaj instrumentoj por analizo kaj mezuro, kiel aŭtomata sango-globetometro, aŭtomata biokeemia analizilo, hemoglobinometro, prehematometro, urin-analizilo kaj fotoelektrometro.

Sun: Kie vendiĝas viaj produktaĵoj? Ĉu ĉefe en la ĉina merkato?

Ozawa: Jes, ĉefe en Ĉinio, ĉirkaŭ 70%.

S-ro Ozawa Masanao (meze) kaj s-ro Huang Shiguang (maldekstre)





Muntado



Respondeculoj de la kompanio en laborejo

Krome, ankaŭ en Hindio, sudorientaj landoj kaj aliaj lokoj.

Sun: Kion klientoj opinias pri viaj produktaĵoj?

Ozawa: El la produktaĵoj de la kompanio iuj specoj estas bonvenaj al klientoj, aliaj pli-malpli kontentigaj kaj triaj malkontentigaj. La medicinaj instrumentoj en la nuna ĉina merkato havas tian karakterizaĵon: la instrumentoj faritaj de Ĉinio mem ne estas tiom bonkvalitaj, kaj tiuj faritaj de eŭropaj landoj kaj Usono estas altkvalitaj, sed tre multekostaj, dum tiuj faritaj de nia kompanio, kvankam kvalite malpli altaj ol tiuj de eŭropaj landoj kaj Usono, estas bonaj kaj malmultekostaj.

Sun: Ĉu vi kontentas pri la profito de la kompanio?

Ozawa: Jes, sed antaŭe ne, ĉar nun la profito kelkoble kreskis.

Sun: Kian administran metodon la kompanio nun alprenis?

Huang: Nek japanan nek ĉinan, sed tiun de la Pekina Erma Kompanio.

Sun: Ĉu vi povas klarigi tion pli detale?

Huang: Kompreneble. Ĉinio kaj Japanio havas malsamajn soci-sistemojn kaj malsamajn kondiĉojn. Ĉinoj substrekas kaj laboron kaj animstaton, tial dum administrado oni devas konsideri ne nur laboron, sed ankaŭ animstaton. En Japanio oni povas levi labor-entuziasmon per altigo de salajro,

sed en Ĉinio ne helpas sole premio. Eĉ kun granda premio laboristoj laboras maldiligente, se ili havas malbonan animstaton. Tial ni prenis parton el japanaj administrativaj metodoj, ekz. ni praktikis sistemon labori naŭ horojn ĉiutage kaj kvin tagojn ĉiusemajne. Samtempe ni aparte zorgas pri la vivo de laboristoj por levi ilian labor-entuziasmon, ekz. organizi amuzan kaj sportan aktivadojn kaj turisman vojaĝon, kiujn ili ŝatas. Mi opinias, ke nur administra metodo enhavanta ambaŭ flankojn konformas al la cirkonstancoj de ĉinalilanda entrepreno kaj vere efikas.

Sun: Ĉu laboristoj ŝatas tian administran metodon?

Huang: Jes.

Sun: S-ro Ozawa, mi aŭdis, ke vi bone kunlaboras kun s-ro Huang. Kiel vi pensas pri tio?

Ozawa: La kompanio malprofitis antaŭ la enoficiĝo de s-ro Huang. Nun jam ŝanĝiĝis la situacio kaj ĝia profito kreskis kelkoble. Antaŭe mi devis longe resti en Pekino, sed nun mi povas foresti por longa tempo. Sen mi la kompanio bone funkcias.

Sun: Kion vi opinias pri la perspektivo de la kompanio? Ĉu vi ne volas longe labori en Ĉinio?

Ozawa: Nia kontrakto validas por 15 jaroj. Nun ĝi estas glate plenumata. Sed ankoraŭ ekzistas iuj problemoj. Niaj produktaĵoj nun vendiĝas ĉefe en Ĉinio kaj tre

malmultaj el ili eksportiĝas. Tio kaŭzas malekvilibron de en- kaj elspezo de fremdaj valutoj. Kaj cetere, medicinaj instrumentoj estas precizaj instrumentoj kaj ege gravas la kvalito. Nun multe altiĝis la kvalito de la produktaĵoj, sed ne sufiĉe. Necesas ankaŭ grandigi la proporcion de la pecoj de la produktaĵoj faritaj en Ĉinio kaj redukti la nombron de pecoj importitaj el Japanio, sed ankoraŭ estas problemoj en la kvalito kaj teknologio de ĉinaj pecoj. Malgraŭ tio la pecoj de la produktaĵoj devas atingi la nivelon de la samaj specoj de aliaj landoj. S-ro raportisto, se la supraj problemoj estos solvitaj, ni kompreneble volonte laboros longe en Ĉinio. La kompanio havas belan perspektivon.

Sun: S-ro Huang, ĉu vi havas fidon pri tio?

Huang: Jes, mi estas fidoplena.

Sun: S-ro Ozawa, mi volus fari al vi alian demandon: Ĉu vi bone vivas en Ĉinio?

Ozawa: Tre bone! Ĉinaj bazaroj estas abundaj, precipe legombazaroj. Ĉar ĉinaj legomoj estas nature kreskantaj, ili estas bongustaj kaj krome malmultekostaj. Mi opinias, ke oni povas eksporti tiujn legomojn...

Sun: Jen ĉio, pri kio mi volas demandi. Mi dankas vin s-roj ĉefkaj vicĉefdirektoroj, pro via akcepto.

Ozawa kaj Huang: Ne dankinde. ■

## EKONOMIO

- Ĉinio akiris gravan sukceson en borado de horizontala petrolputo. Dank' al tiu tekniko nomata la "dua revolucio de petrola industrio", la taga olea produktokvanto de horizontala puto estas dekobla de tiu de ordinara vertikala puto.

- La Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio najbaras al Nepalo, Hindio, Bhutano kaj Birmo kaj havas kun ili komunan limon de 4 000 kilometroj. La limregiono estas paca dum longa tempo. Tie la ekonomio disvolviĝas stabile, la popola vivo estas feliĉa. Nun la produktovaloro de agrikulturo kaj brutobredado de la limregiono atingis 135 milionojn da juanoj (5.4 juanoj egalas al unu usona dolaro). Ĝi konsistigas 17.2% de tiu de la tuta regiono. Multe pliboniĝis la trafiko, energioprovizo, translima komerco, higieno, kulturo, edukado kaj la popola vivo. Aperadas novaj domoj kun naciaj gustoj. Multaj familioj posedas magnetofonon, televidilon k.a.

- La plej granda internacia aerodromo de Ĉinio estis transdonita al trafiko en Xianyang de Shaanxi-provinco. La aerodromo kun areo de 180 hektaroj estas unuaklasa civila aerodromo de nia lando. La atendejo estis komplete ekipita per modernaj instalaĵoj el komputera bilet-kontrolejo, iks-radia sekur-ekzameno, valiza transport-bendo, hermetika transira koridoro, elektronika montropanelo de flugnumeroj, ferm-cirkvita televido kaj aŭtomata fajroestinga sistemo.

- Oni jam konstatis post prospektorado, ke sub la 1 200-kvadratmetra antikva elstaraĵo en la baseno Shaanxi-Gansu-Ningxia-a konserviĝas 200 miliardoj da kubmetroj da natura gaso. Ek-



Telfero ĉe la Granda Muro



Prezentado en la Arta Festivalo de Sudokcidenta Ĉinio

spluato de tiu plej granda gaskampo de Ĉinio ludos gravan rolon por konstruado de la vasta nordokcidento de Ĉinio.

- 52 ĝardeno-konstruistoj de la Suzhou-a Konstrukompanio de Klasika Ĝardeno veturis al Singapuro por konstrui tie Yunxiu-ĝardenon de suzhou-a stilo, la kvinan ĝardenon de la kompanio eksterlande. La ĝardeno kun areo de 5 700 kvadrataj metroj enhavas 15 sendependajn konstruaĵojn. La bezonataj altkvalitaj ligno, ŝtono kaj aliaj valoraj materialoj estis jam transportitaj en Singapuron.

## TURISMO

- Inaŭguriĝos la 1-an de januaro 1992 la Ĉina Amikeca Turisma Jaro 1992 kune aranĝita de la Ĉina Ŝtata Turisma Buroo kaj la Ĉina Civila Aviada Buroo. Por tio turismaj servoj de Ĉinio proponis 14 itinerojn inkluzive de la Granda Muro, La Flava Rivero, la Tri Gorgoj de Yangzi-rivero kaj la Silka Vojo. Krome, oni aranĝos entute cent turismajn aktivecojn kaj invitos mempagajn turistajn grupojn de cent ĝemelaj urboj eksterlande. Por danki eksterlandajn agentojn la Organiza Komitato por la Amikeca Turisma Jaro invitos mil el ili al vojaĝo en Ĉinio. En la Turisma Jaro oni aranĝos gastronomian karnavalon, artan festivalon, turistan fotokonkurson, "Ĉinio en miaj okuloj", turisman foiron, la Trian Turistan Aĉetadon k.s.

- La Granda Muro nun havas sian unuan telferon ĉe Badaling en Pekino. La telfero ĉe la norda flanko de Badaling longas 789 metrojn. La veturado por la distanco bezonas 3 minutojn. Baldaŭ finiĝos la konstruado de la telfero ĉe la suda flanko de la Granda Muro.

- La unua ĉina luksa turisma ŝipo "Paradizo de



Yangzi” de kvar steloj estis lanĉita en Wuhan. La ŝipo havas 6 etaĝojn kaj estas ekipita per IDDD. Sur la ŝipo estas balejo, golfejo, naĝbaseno kaj saŭno. Sur la ŝipo estas senbara belvidejo. La ŝipo povas akcepti 130 pasaĝerojn kaj al ili disponigas kajutojn luksan superklasan, balkonan, norman kaj sollitan.

## KULTURO

- En la tri najbaraj provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan vivas pli ol 30 nacioj ĉiu kun sia propra nacia kulturo. De la 14-a ĝis la 20-a de aŭgusto okazis en Guiyang, la ĉefurbo de Guizhou-provinco, la Arta Festivalo de Sudokcidenta Ĉinio. Dum la festivalo artistoj el la tri provincoj prezentis 48 fojojn operojn, dancojn kaj kantojn kun fortaj lokaj gustoj. Por helpi amasojn en inunditaj regionoj de Guizhou, la artistoj faris beneficon.

- En la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio vivas 15 milionoj da homoj el 13 nacioj inkluzive de ujuguroj, hanoj, kazahoj, mongoloj kaj sibooj. Same kiel en aliaj nacimalplimultaj aŭtonomaj regionoj, tie oni establis nacilingvajn instituciojn de ĵurnalismo, eldonado, radiodisaŭdigo, kino, televido, instruado, tradukado, literaturo kaj arto. Tial nacimalplimultanoj en foraj, izolitaj lokoj povas ricevi novaĵojn en- kaj eksterlandajn.

## SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Sciencistoj konstatis, ke formiko ekzistis sur la ter globo jam 100 milionojn da jaroj. Nun en la mondo troviĝas 14 000 specoj da formikoj, dum en Ĉinio troviĝas 600 specoj, el kiuj 4 specoj estas uzeblaj por gastronomio kaj farmacio. Antaŭ ne longe Ŝanhajo sukcesis en bredado de formiko por farmacio. Ĉinio estas la dua lando post Meksikio en bredado de formiko.

- Ekspertizon trapasis la prognoza provilo por koncipiĝo post 7 tagoj produktita de la instituto de botanika provilo de Henan-provinco de Ĉinio. Fakuloj opinias, ke la provilo atingis la internacian nivelon. La sukceso ludos gravan rolon en embrio-protektado kaj eŭgeniko. Raportoj de provoj sur 50 000 homoj konfirmis, ke la provilo estas sentiva, facile uzebla, senpolucia kaj donas rezulton en 4 minutoj.

- En la pasinta novembro 34-jara ŝanhaja virino suferanta nekoncipeblecon akceptis operacion faritan de la Mondpaca Virina-Infana Sanprotektejo: elpreni el la ovario maturan ovolon, meti ĝin en la spermon de ŝia edzo kaj poste en salpingon. Aŭguston de 1991 la virino naskis infanon.

## SOCIO

- Post la decido subvencii 1 200 eminentajn sciencistojn, fakulojn, profesorojn kaj eruditojn, la ŝtato subvenciiis pliajn 10 000 elstarajn intelektulojn kaj proklamis la kontribuan subvencion ĝis 1995. La subvencio estas libera de salajra reguliga imposto. Ili ĝuas la subvencion malgraŭ emeritiĝo.

## SPORTO

- En la Tria Monda Atletika Ĉampioneca Konkurso ĉina sportistino Huang Zhihong gajnis oran medalon de pezgloboĵeto je 20.83 metroj. Ŝi estis la unua mondĉampiono de Ĉinio kaj Azio en la atletika konkurso. Ĉina sportistino Xu Demei gajnis la ĉampionecon de lancoĵetado je 68.78 metroj.

Huang Zhihong en konkurso



# SILUETA ARTO DE LI TIANHUA


**S**ILUETOJ ĉi tie montrataj estas verkoj de la ĉina kamparano Li Tianhua. La ĉinaj popolaj siluetoj estas apartaj artaĵoj disvolvigintaj el la homfiguroj de la antikva ombroteatro. Uzante la le-

ĝon de projekcio kaj sin bazante sur sia sperto pri arto, oni artisme troigas objekton por tondado kaj faras silueton en altgrada resumo. Por fari silueton, oni bezonas nur tondilon kaj nigran kaj blankan paperojn. La nigra papero servas

por silueto kaj la blanka por ĝia fono. La nigra kaj blanka koloroj forte kontrastantaj donas belecon.

Li Tianhua naskiĝis en vilaĝo de Henan-provinco kun gustoplena popola arto. Li ŝatas kaligrafion kaj pentradon jam de la infaneco. Lia patrino estis lerta en brodado kaj ofte eltondis por aliaj brodajn paperajn modelojn kun bildoj de floroj, herboj kaj bestetoj. Li Tianhua tion rigardadis kaj ofte imitis la patrinon. Iom post iom perfektigis liaj eltondaĵoj. La patri-

La ĉina verkisto Lusin



no senĉese instruis lin kaj donacis liajn eltondaĵojn al aliaj, kio vekis en li pligrandan intereson. En sia dekkelkjara aĝo li jam povis eltondi multajn specojn da bildoj.

Foje li vidis, ke iu maljuna metiartisto tondas profilan silueton sur strato. Li tion rigardis preskaŭ duontagon, ĝis la metiartisto finis la laboron. Reveninte hejmen, li ektondis silueton kiel la metiartisto. En la komenco li ne bone tondis, li do ofte iris rigardi la tondadon de la metiartisto, poste li serioze remaĉis la tondmanieron kaj tondis ĉiam en libera tempo, tial lia arto senĉese altiĝis. Li montris al aliaj la profilaĵajn siluetojn de najbaraj infanoj detonditajn de li, kaj ĉiuj laŭdis, ke liaj verkoj estas vivoveraj.

Li Tianhua tiel iris en novan kampon de arto. Li tondas ne nur profilaĵajn siluetojn kiel la maljuna metiartisto, sed ankaŭ bustajn kaj tutkorpajn siluetojn kaj siluetojn kun dioramo. Li kaj faras tondadon kaj lernas la principon de projekcio, proporcio de homa korpo kaj normon de skizo. En 1987 li veturis al Pekino por peti s-ro Chen Zhinong, fame konatan sil-

uettondiston, kiel instruiston. Dank' al ties direktado li bone posedis la teknikon kaj ekkonis la teorion de arto.

Li Tianhua tondadis siluetojn pli ol 30 jarojn. Li havas la kapablon rapide detondi siluetojn vivoveraj. Li diris, ke dum tondado oni nepre devas milde glatigi la randon kaj eviti fuŝan ĉirkaŭtondadon.

Post raportado de radio-kaj televidstacioj, ĵurnaloj kaj revuoj la siluetoj de Li Tianhua altiris la atenton de multaj personoj. Iuj lokoj kaj universitatoj invitis lin fari prelegon kaj demonstradon. En la lastaj jaroj Li Tianhua studis novan teknikon unuigi siluettondadon kaj kaligrafion kaj akiris rimarkindan sukceson. Li volas sin liberigi de la tradicia tondado de unukolora silueto kaj provtondi plurkoloran silueton. Krome li ankaŭ strebas por tondi frontan silueton. Ĉio ĉi postulas grandan lertecon. Li esprimis, ke li fidiplene venkos ĉiajn malfacilojn. ■




Violonistino

Sub ombrelo



Pramado



Kalkulu

La ĉefpinto Ĝomolangma de Himalajo, la tegmento de la mondo, estas alta je 8 848 m super la marnivelo kaj konata kiel la unua alta montpinto de la tero. Tamen ĵurnalo ne opiniis tion ĝusta, dirante: "Kvankam mi estas dika je nur 0.01 cm, tamen duoble faldita en 30 fojoj, mi estos multe pli dika, ol la alto de Ĝomolangma." Kalkulu kaj juĝu, kara leganto, ĉu la ĵurnalo fanfaronis.

(la solvo troveblas en ĉi tiu numero)



Humuraĵo

Kiam ebrulo ŝanceliĝe paŝis tra zoo, leono elkaĝiĝis. Terurite, oni kuris for. Sed la ebrulo senzorge iris al leono, kaptis ĝiajn kolharojn kaj enkaĝigis ĝin.

En la sekva tago urbestro intervidiĝis kun li, dirante: "Oni faras por vi medalon. Mi opinias la plej granda kapti leonon senarmile." La kaptinto malebriiĝinta frapis al si la kapon, kriante: "Mia Dio, ne diru al mi, ke la leono estas vera!" Je tio li svenis.

Vegetalaj Enigmoj

I  
Aspekto stranga montriĝas,



Nepo protektata de Miao Di

Talie haroj kovras,  
Se vi levas la harojn,  
Dentoj en vicoj vidiĝas.

II  
Sub tegmento makula,  
En ruĝa vualo,  
Dormas blanka dikulo.

III  
Ĝi ĉiam rigardas al la suno,  
Kaj neniam montras fanfaronon.  
Ju pli da enhavo,  
Des pli da kapklino.

IV  
Ili grimpas sur barilon  
Kun funelformaj floroj,  
Ĉarmas en la sunbrilo  
La ruĝaj kaj blankaj floroj.  
(La solvoj troveblas en ĉi tiu numero)

La respondoj por Demandaro por la Dua Konkurso de EPC-legado:

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
C	B	A	A	B	C	B	A	B	C

# Tridek grajnoj

de KUZMENKO LARISA (USSR)

Nokte, sur la malsekajn arbojn falis neĝo, poste la neĝo frostiĝis kaj forte gluiĝis al la branĉoj.

Alflugis paruelo.

Mi malfermis ventolĝiceton, lokis liniilon sur trabo de la framo kaj metis po kanaban grajnon por centimetro. La unua grajno troviĝis en la ĝardeno kaj la lasta estis en mia ĉambro.

La paruelo ĉion vidis, sed longe ne volis flugi al la fenestro. Fine ĝi

prenis la unuan kanaberon kaj metis ĝin sur branĉon.

Ĉio okazis bone. Tiam la paruelo prenis la duan grajneton.

Mi sidis ĉe la tablo kaj laboris. De tempo al tempo mi rigardis al la paruelo. Ĝi proksimiĝis laŭ la liniilo centimetron post centimetro. Ĝi kvazaŭ demandis:

— Ĉu mi povus forbeki ankoraŭ unu grajneton?

Kaj la paruelo forflugis kun an-

koraŭ unu kanabero sur la arbon.

— Nu, ankoraŭ unu! Ĉu bone?

Jen restis la lasta grajneto. Ĝi kuŝis sur la ekstrema fino de la liniilo. Estis timege iri al ĝi!

La paruelo kaŝiris sur la ekstremon kaj aperis en mia ĉambro.

Scivoleme ĝi rigardis la nekonatan mondon. Precipe ĝi miris pro la verdaj floroj kaj tute somera varmo en la ĉambro.

— Ĉu vi loĝas ĉi tie?

— Jes.

— Kial ĉi tie ne estas neĝo?

Anstataŭ respondo mi turnis ŝaltilon. Sub la plafono ekheliĝis luma globo.

— Suno! — miregis la paruelo.

— Kio estas tio?

— Libroj.

— Kio estas libroj?

— Ili instruas lumigi la "sunon" kaj kreskigi florojn kaj arbojn, sur kiuj vi saltas, kaj multon alian.

— Tre bone. Vi tute ne estas timiga. Kiu vi estas?

— Mi estas homo.

— Kio estas homo?

Estis malfacile ekspliki ĉi tion, sed mi diris:

— Ĉu vi vidis la fadenon? Ĝi estas ŝnurligita al la ventolĝiceto...

La paruelo timeme ĉirkaŭrigardis.

— Ne timu. Mi faros nenion malbonan al vi. Tio nomiĝas homo ĉe ni.

— Ĉu mi povus manĝi la lastan grajneton?

— Jes, certe! Mi volas, ke vi flugu al mi ĉiutage. Rigardu, kiel mi laboros. Ĉu vi konsentas?


— Bone. Kio signifas "labori"?

— Nu, vidu, tio estas devo de ĉiu homo. Sen ĝi ne eblas vivi. Ĉiuj homoj devas ion fari. Per tio ili helpas unu al alia.

— Do, kiel vi helpas al aliaj?

— Mi volas verki libron, por ke ĉiu, kiu legos ĝin, metu sur sian fenestron tridek kanabajn grajnoj.





ZHANG QINGZHEN:


# Vojaĝo sur Baiyangdian-lago

Fiŝista boato revenanta ĉe sunsubiro

Foto de JIN JIE



Boatoj kun fiŝagloj  
Foto de CANG XUAN




Fiŝista familio Foto de JAN JIN



Turistoj en motorboato Foto de JAN JIN

Turisma loko en la lago Foto de JAN JIN





Bredado de fiŝoj en retformaj kestoj



Fragmitaj matoj transportataj aliloken

**B**AIYANGDIAN estas la plej granda lago sur la Nordĉinia ebenaĵo. Ĝi kovras areon de 360 km<sup>2</sup>. La 3700 navigaciaj vojoj apartigis ĝin en 143 marĉojn. Tio estas surakva labirinto el fragmitoj, fluejoj kaj marĉoj.

La lago estas malprofunda. Ĝenerale ĝia profundo ne superas 3 metrojn. Pro la fekunda sapropelio, riĉa sunradiado kaj nutroriĉa akvo ĉi tie abunde kreskas akvaj bestoj kaj vegetaloj. La lokanoj disvolvas fiŝbredadon kaj sukcese provbredis fiŝojn en retforma kesto. Multe da loĝantoj ĉe la lago sin

vivtenas per kaptado de fiŝoj, salikokoj kaj kraboj. En la fiŝkapta sezono fiŝboatoj navetas sur la lago kaj eĥigas sur la lago krio "Oŭ-hoo, aj-heej", per kiu la fiŝistoj pelas fiŝaglojn kapti fiŝojn.

Oni plektas maton el fragmitoj. La akvo de la lago estas uzata por irigaciado de kampoj, kio garantias al la loko riĉan rikolton. La lago famas ankaŭ per la produktado de trapaj fruktoj kaj lotusradikoj. Ĝi estas lando de fiŝoj kaj rizo en norda Ĉinio.

Jam de longe famas la lago pro siaj granda areo kaj belaj pejzaĝoj. Tie vidiĝas nemalmultaj historiaj

vidindaĵoj kaj cirkulas belaj legendoj. Inter ili estas antikvaj pontoj konstruitaj en Yuan-, Ming- kaj Qing-dinastioj (1206-1911). Nun ili jam fariĝis vidindaĵoj por turistoj.

Marĉoj estas aliaj vidindaĵoj de la loko. Ĉi tie troviĝas 99 grandaj kaj 44 malgrandaj marĉoj. La marĉoj estas kovritaj de densaj fragmitoj, inter kiuj kruciĝas akvaj vojoj. En la profundo de marĉoj kuŝas insuletoj, kie estas fiŝistaj vilaĝoj. Antaŭvidaj baiyangdian-anoj jam projektis planon de turismo antaŭ kelkaj jaroj. Ili konstruis turismajn lokojn, kiaj belaspekta Ambirda Insuleto kaj Nacia Insuleto plena de naciaj gustoj. Kune kun entreprenoj de Pekino kaj Tianjin ili konstruigis lotusan lagon, funkciigis pli ol 20 amuzejojn, kiaj natura naĝejo, kampadejo, muzeo, fiŝokejo, ĉasejo, surakva dancejo, pli ol 90 restoraciojn kaj hotelojn kun lokaj trajtoj. De 1988 ĝis nun 800 000 en- kaj eksterlandanoj vizitis la lokon.

Nun la turistoj povas sin distri per boatveturado, libere naĝi, kapti fiŝojn kaj krabojn, ĝui bongustajn pladojn preparitajn el fiŝoj, salikokoj, kraboj kaj pektenoj kaj ĝui la kulturon kaj vivon de la loko.

Ĉi tie neniu povas vojaĝi sen boato, kaj ĉiuj deziras sin distri boate. En la turisma sezono preskaŭ ĉiuj lokanoj luigas sian boaton al turistoj, kompreneble la lokanoj enspezas ian sumon da mono de tio.

Ĉi tie funkcias ĉefe motorboato kaj sentegmenta boato. La motorboato estas malgranda kaj rapida. Gejunuloj ŝatas veturi per ĝi por sturmi ondojn. Sed la turistoj plejparte preferas sidi en sentegmenta boato kaj ĝui akvan plaŭdadon sub remiloj kaj aprezi ĉarmajn pejzaĝojn. Tiam oni sentas sin facilanimaj kaj plezuraj.

Vespere, kiam subiras la suno, ĝia lumo origas la tutan lagon, la dense kreskantajn fragmitojn, la puran akvon kaj malgrandajn boatojn, kvazaŭ ili kondukus la turistojn en fean landon. ■



# Ŝtona urbeto ĉe Maro

Teksto de CAO WEI

Fotoj de CAI HAIFENG

**C**E maro oriente de Zhejiang-provinco, Ĉinio, sidas mezgranda fiŝista vilaĝo. Ĝi nomiĝas Shitang. Kvankam ĝi ne povas rivali kun la ĉarma Okcidenta Lago kaj akvoriĉa Shaoxing en la provinco, tamen ĝi distingiĝas per arkitekturo. Antikvecaj kaj imponaj ŝtondomoj kroĉiĝas al montodeklivoj, unuj super aliaj. Kiel konate, Nia Damo de Parizo estas vizitenda por pentristoj, kaj ankaŭ Shitang-vilaĝo ne estas fremda por ĉinaj pentristoj.

Mi alvenis la vilaĝon, kiu estas efektive granda urbeto. Starante sur monto ĉe la maro, vi povas vidi krutaĵojn antaŭ vi kaj ŝaŭmantajn ondojn forte frapantajn la nigran bordon. Retrorigardante, vi havas panoraman vidon de la urbeto: De la mezo de la oblonga valo ĝis la monteĝoj dissemiĝas ŝtondomoj. Sur zigzagaj stratoj vidiĝis fiŝistoj ŝultre portantaj retojn, etkomercistoj vekte portantaj varojn kaj marĉandantaj virinoj kun infano en la brakoj. La homfluo montris grandan spektaklon.

La arkitekturo de la urbeto estas plej altira. La loko estas malvasta kaj tute ne vidiĝis ebena tero, ke oni devas konstrui domojn sur montodeklivo. La lokanoj, kvankam malriĉaj antaŭe, ekloĝis en ŝajne luksaj domoj antaŭ 100 jaroj. Kial? Pro manko de ebenejo!

En la urbeto la okulojn frapas la konstruaĵoj el ŝtonpecoj. En Shitang mankas tero. Ĉie estas flavecaj ŝtonoj. Oni konstruas domojn el


ŝtonpecoj kaj loĝas en ili sen timi tajfunon. Rigardate de malproksime, la domoj aspektas kiel fortikaj citadeloj de la mezepoka Eŭropo. La tegmentoj estas tegolitaj. Ĉiu tegolo estas garnita per ŝtonetoj kaj aspektas kiel olepentraĵo de la abstrakta skolo. Nature, el tio imageblas ĝia rolo.

Promenante en la urbeto, vi povas trovi, ke tieaj domoj havas longan historion. La plej maljuna el la ŝtondomoj havas duflanke ŝtonan muron kaj ĉe aliaj du flankoj tabulan muron. Ŝtona muro restas preskaŭ senŝanĝa, tamen humida kaj ŝima tabula muro klare vidigas postsignojn de vento kaj pluvo dum longa tempo. La dugrade maljuna domo havas ŝtonan muron kvarflanke, kun pli malgran-

daj fenestroj. Kaj la domoj konstruitaj pli poste havas ian novan formon. Anstataŭ duetaĝaj, ili estas tri- aŭ kvaretaĝaj, kvazaŭ fortikaj. La muro estas konstruita el brikoj kaj ŝtonpecoj, kaj la fenestroj estas pli grandaj ol iam antaŭaj. Iuj domoj havas eĉ luksan pordon el aloja aluminio. Riĉuloj de la urbeto ne plu uzas ŝtonojn por konstrui domojn, sed anstataŭe ili konstruas domojn el brikoj kaj antaŭpremitaj armita betono venigitaj de malproksime. La domoj spiras je etoso de tempo.


Kvankam la formo de domo multe ŝanĝiĝis, tamen la vivmaniero de la lokanoj restas preskaŭ sama, kiel antaŭe. La unua etaĝo estas destinita por gastejoj, ludado, manĝpreparo kaj man-


Novaj ŝtonaj domoj






Strateto de la urbeto






La ĉemara ŝtona urbeto



En kaj ekster ŝtona domo

La ŝtona urbeto



gado. La dua kaj pli superaj etaĝoj servas kiel dormoĉambroj, kiujn ne devas viziti gastoj sen permeso. La unua kaj dua etaĝoj estas ligitaj per ligna ŝtuparo. Por supreniri ĝin oni devas demeti la ŝuojn. Mi tre malofte vidis tiom krutan ŝtuparon. Kiam mi invitate supreniris ĝin kun timemo, mi trovis, ke la 4-jara filino de la mastrino lerte supren- kaj malsupreniris sur la ŝtuparo.

La lokanoj fieras pri sia vivo. Multaj fiŝistoj diris al mi sen ia troigo, ke la enspezo de ilia unufoja fiŝado egalas al mia tutjara salajro. Fakte, la fiŝistoj fariĝis multe pli riĉaj, kio videblas el iliaj domoj.

Kiel fiŝista vilaĝo, Shitang havas mezlongan historion. Oni diras, ke en Yuan-dinastio (1279-1368) iuj kaptis fiŝojn tie. En Ming-dinastio (1368-1644) vivis tie nemultaj homoj kaj de Qing-dinastio (1644-1911), pro plago tien venis el la najbara Fujian-provinco granda nombro da fiŝistoj. Rezulte, ŝtonaj domoj plimultiĝis kaj ekfuroris tie moroj de okcidenta Fujian, kiel porti florojn surkape kaj kulti Mazu, diinon de maro.

La tieaj edzinigitaj virinoj havas sur la kapo tre ĉarman hartuberon kun diverskoloraj floretoj sur ĝi. En iliaj okuloj, kiel okulo, tiel ankaŭ la haroj estas spegulo de la animo, kiu ree prezentas homan karakteron kaj humoron. La pura kaj nigra hartubero kun unu ruĝa floreto sentigas al vi belecon kaj prezentas al vi la puremon kaj belan vivon de la virino. Kompreneble, ne ekzistas ĉiam perfekta vivo. Kiam virino portas neluksan veston kaj ornamas sian kapon per flava aŭ blanka floreto, ĉiuj, kiuj bone konas la morojn de la loko, senescepte simpatias kun ŝi, ĉar ŝi estas vidvino. Tamen, kun la ekonomia disvolviĝo kaj plioftaj kontaktoj kun aliaj lokoj en la lastaj jaroj, junaj edzinigitaj virinoj de la loko, ŝajnas, ne plu memoras la ornamon.

Mazu estas diino de maro kultata de fiŝistoj en la ĉemara prov-

inco Fujian, Ĉinio. Se vi demandas iun ajn en Shitang, li povas rakonti al vi ion pri Mazu. Legendo diras, ke en la antikveco vivis bela fiŝista knabino Mazu. Foje, ŝiaj patro kaj frato fiŝis sur la maro. Nokte ŝi songis, ke ŝi transformiĝis en flugantan birdon, kiu tenis per la beko sian dronantan patron kaj per la ungoj sian fraton. Malfeliĉe, ŝi vekiĝis de tondro, kaj la patro kaj frato neniam revenis. De tiam kun malĝojo kaj bedaŭro ŝi preĝis por ĉiu fiŝisto laboranta sur la maro. Mia alveno koincidis kun Mazu-festivalo, kiam la tieaj fiŝistoj dronis en granda gajeco.

Kiam mi iris sur zigzaga strato, mi aŭdis tamburadon kaj gongadon tra marvento. Por soleni Mazu-festivalon oni prezentas teatron. Laŭ la tamburado mi juĝis, ke la teatro ne estas fore de mi. Mi iris en labirinto da ŝtonaj domoj kaj jam post longa tempo ne trovis la teatron. Feliĉe mi renkontiĝis kun fiŝisto kaj sub lia gvido mi fine atingis la teatron.

La portempa teatro estis konstruita el trabaĵo, tabuloj kaj larĝa ekrano. Ĉirkaŭ la teatro kunpuŝiĝis rigardantoj-fiŝistoj. En la unuaj vicoj sidis sur benkoj nur pluraj maljunuloj kaj ĉiuj aliaj staris sur la deklivo ĝis la monteĝo, kio formis naturan teatron.

La teatraj

prezentantoj estis invititaj el alia loko. Kvankam ili ne bone prezentis, tamen en la okuloj de longantoj, gravas ne arto, sed festa etoso. Fakte, la prezentado finiĝis per dezirata efiko. Reveninte hejmen de la maro, fiŝistoj sidiĝis antaŭ la teatro por ĝui la prezentadon omage al Mazu tiel multe, kiel ili povis.

Samtempe kun tio, en Mazu-templo estis metitaj diversaj kukoj kaj rostitaj porkoj kaj kaproj en tuteco. Post kiam la fiŝistoj bruligis incenson antaŭ la templo, ili, pie sidiĝinte antaŭ la statuon de Mazu, silente preĝis pri sia volo. Post momento iu ekkantis por rememorigi pri Mazu. La kanto kaj incens-fumo portis la aspiron de la lokanoj al la feliĉa vivo kaj ŝvebis super la statuoj. ■

Prilaborado de marproduktaĵoj






Antaŭ ŝtona domo

Flikado de fiŝreto


Loĝantoj



Istanbulo, la plej granda urbo en Turkio, estas dividita de la markolo Bosporo inter Eŭropo kaj Azio kaj la golfo Hariĉ en tri partojn.


Turkio estas islama lando. Sennombraj moskeoj sidas en Istanbulo. El abundo da antikvaĵoj en la urbo la plej fama estas Blua Moskeo 43 m. alta. Ĝi, kiel la plej giganta moskeo en la urbo, konstruiĝis en 1609-1616. Ĝi kun duonsfera kupolo havas 260 fenestro-pordojn. Oni diras, ke la turka sultano postulis konstrui ĝian pinton el rafinita oro, tamen tio estis tute neebla siatempe. Sekve, saĝa inĝeniero konstruigis ses pintajn turojn ĉirkaŭe sur la Blua Moskeo por simboli, ke la pinto de la Blua Moskeo estas ora, ĉar la vortformoj de "oro" kaj "ses" en la turka lingvo estas similaj unu al la alia. Kiam finkonstruiĝis la Blua Moskeo, la sultano trovis, ke la ses pintaj turoj ne estas oraj kaj konsciigis, ke li estis trompita, tamen li ne punis la inĝenieron pro tio, ke li admiris la talenton de la inĝeniero. La Blua Moskeo tiel fariĝis nura moskeo en la mondo, kiu havas ses pintajn turojn.

Veninte en Turkion, oni ne vere ĝuis la vivan intereson de la loko, se oni ne prenis la turkan banon. En Istanbulo Kagloglu estas la plej antikva kaj giganta banejo. La banejo konsistas el du partoj por viroj kaj por virinoj. Ĝia porvira parto aspektas pli granda. Enirinte la ĉefan halon, oni torvis en la mezo fontanon el marmoro. Portante mantukojn kaj lignoŝuojn, la klientoj eniris la vaporplenan banĉambron, kiu kovras areon de ĉ. 2 000 kvadrataj futoj. En ĝia mezo kuŝas ŝtonplato, ĉe kiu kelkaj viroj, kun lipharoj kaj grandaj okuloj, masaĝis por la klientoj. La vizitantoj, unuafoje venintaj, tremis de timego, rigardante, kiel krake la masaĝistoj premfortadis kaj knedadis la manajn kaj piedajn artikojn al la klientoj. Tamen, sin baninte en la banejo, ili ĉiuj laŭdis la senlacigan masaĝon. ■



La Reĝa Palaco

Stando de poŝtkartoj





TRA LA MONDO

# Pri Istanbulo


de CAO WEI

La Blua Moskeo



Virino en islamana vesto

Turka danco





Vortoj priplantitaj per verdaj fazeoloj de MICHEL LAVERGNE (Francio)  
En kampo de Britio de TSUNEKO NAKAKITA (Japanio)






# 5-A PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO



17-a — 22-a aŭgusto 1992  
Qingdao, Ĉinio



Hotelo Huanghai, nia Ĉi-foja kongresejo



## Salutvortoj de la urbestro de Qingdao

Mi havas grandan plezuron esprimi, en la nomo de la magistrato kaj la sesmiliono popolo de Qingdao, varman bonvenon al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto kaj kore deziras al ĝi plenajn sukcesojn.

Qingdao estas unu el la urboj de Ĉinio, kie Esperanto-movado ekestis sufiĉe frue. Jam en 1912 tie fondiĝis Esperanto-Asocio. Kaj en la lastaj dek jaroj rapide progresis la tiea Movado. La Qingdao-a Esperanto-Ligo fondita en 1986 havas ĉirkaŭ 1 000 membrojn. Pli ol 3 000 homoj lernis Esperanton en universitatoj kaj mezaj kaj elementaj lernejoj. La Televida Esperanto-filmo "Espero" kun 24 lecionoj farita de Qingdao estis dissendita respektive de la Televido de Qingdao kaj la Ĉina Centra Televido. La organo de la Ĉina Esperanto-Ligo "La Mondo" havas sian redakcejon en Qingdao. La Qingdao-a Branĉo de la Ĉina Internacia Turisma Servo havas Esperanto-Fakon. Venis al Qingdao pli kaj pli multaj esperantistoj el aliaj landoj por turismo, komerco kaj scienco, teknika kaj kultura interŝanĝoj. Mi sincere esperas, ke la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto forte inspiros la Movadon de Qingdao.

Qingdao estas fama turisma urbo ĉirkaŭita de la maro en tri flankoj, kun pluraj montetoj kaj amaso da verdo. Ĉe la marbordo imprese allogas la varfo-ponto, Lusin-parko, Xiaoyushan-parko kaj aliaj vidindaĵoj, kaj la ebenaj plaĝoj, la klara akvo kaj la mildaj ondetoj vekas apartan deziron al marbano. La modernaj hoteloj konstruitaj en la lastaj jaroj ofertas variajn servojn.

La apika Laoshan-monto ĉe la maro en la ĉirkaŭurbo estas unu el la sanktejoj de Taoismo de Ĉinio kaj famas pro siaj mirindaj pejzaĝoj kaj temploj kun historio de pli ol 1 000 jaroj. Ravas ankaŭ la ruino de la Belevidejo Langyatai konstruita dum la regado de la unua imperiestro de Ĉinio antaŭ 2 200 jaroj kaj la Steleo Memore al Prefekto Zheng Xi ĉizita antaŭ 1 500 jaroj.

Qingdao ankaŭ estas unu el la plej grandaj havenoj de Ĉinio por ekstera komerco, kun prospera industrio kaj facilaj trafikoj mara, fervoja kaj aera. La biero kun marko "Qingdao", la minerala akvo de Laoshan kaj la seka blanka

**PE2.** Qingdao—Beijing—Yanji (Changbai-monto)—Beijing (7 tagoj)  
**PE3.** Qingdao—Beijing—Chengdu—Tibeto—Chengdu—Shanghai (13 tagoj)  
**PE4.** Qingdao—Shanghai—Hangzhou—Guilin—Guangzhou (9 tagoj)

### C. Notoj

1. La prezoj kaj detalaj informoj pri ĉiuj ekskursoj aperos en la Dua Bulteno.
2. La minimuma nombro por ĉiu ekskurso estas 16 personoj. Se la mendintoj ne atingos la minimuman nombron, la ekskurso nuligos.
3. Eblas aranĝi ekskursojn proponitajn de kongresanoj. Tiukaze bonvolu informi via(j)n dezirata(j)n itinero(j)n al la Organiza Komitato pere de vialanda peranto antaŭ la 15-a de novembro 1991.

## Kongresaj perantoj

*Se en via lando estas peranto, preferere sendu vian aliĝilon kaj pagon al ties adreso. Se ne, sendu la aliĝilon kaj pagon al la adreso de la Organiza Komitato. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.*

**Aŭstralia:** S-ro Tom Elliott, P.O. Box 230, Matraville, NSW 2036

**Francio:** S-ino Raymonde Perault, p/a Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

**Hindio:** Federacio Esperanto de Bharato, 35/1, Swami Vivekananda Road, Howrah-711 101

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to 162

Internacia Kultura Laborejo, I.P.O.B. 5458, Tōkyō 100-31

**Kanado:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C. V8L 3S6

**Koreio:** Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Kesto 4285, Seoul 100-642

**Malajzio:** S-ino Chan Sook Wai, p/a Malajzia Espranto-Asocio, 1008 Jalan Selesa 4, PTM-58200 Kuala Lumpur

**Meksikio:** Meksikia Esperanto-Federacio, Apartado Postal 10576, Meccico DF 06000

**Nov-Zelando:** S-ro Paul Friedman, 40 Malcolm Street, Hamilton

**Pakistano:** Pakistana Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 549, Multan-6000

**Singapuro:** Singapura Esperanto-Asocio, p/a Tanjung Pagar, P.O. Box 0634, SGP-9108

**Sovetunio:** Sovetrespublikara Esperantista Unio, ul. Volhonka 13, SU-119820

Moskva

**Usono:** S-ino Lucille Harmon, p/a Esperanto Vojaĝ-servo, 6104 Lasalle, Oakland CA94611

**Vjetnamio:** Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 105A Quan Thanh Strato, Hanoi

# Aranĝoj de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto

## Kongresa semajno

La Kongreso okazos de la 17a ĝis la 22a de aŭgusto, 1992 en la Hotelo Huanghai, kiu tre simpatias al Esperanto kaj nia ĉi-foja Kongreso.

La kongresa temo estas: **Kunlaboro kaj progresigo en la pacifika regiono.**

Detalaj informoj aperos en la Dua Bulteno, kiun la Organiza Komitato sendos al la aliĝintoj januare 1992.

## Turisma pakaĵo

Por la kongresa semajno kaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, la Organiza Komitato proponas preni la turisman pakaĵon, kiu estas malpli kosta ol se oni mendas unuopajn servojn. La Esperanto-Fako de la Qingdao-a Branĉo de la Ĉina Internacia Turisma Servo (ĈITS) transprenis la taskon aranĝi la loĝadon, manĝadon kaj veturadon de la kongresanoj.

La prezo de la turisma pakaĵo inkluzivas liton en norma dultita hotelĉambro, tri manĝojn ĉiutage kun variaj gustoj, veturadon, vizitadon al vidindaĵoj, valizotransporton, interpretadon kaj ĉiĉeronadon en Esperanto, asekuron kaj peton pri vizo.

## Ekskursoj antaŭ kaj post la Kongreso

### A. Antaŭkongresaj ekskursoj

- AE1.** Guangzhou—Guilin—Xi'an—Beijing—Qingdao (9 tagoj)
- AE2.** Shanghai—Hangzhou—Suzhou—Nanjing—Xi'an—Beijing—Qingdao (12 tagoj)
- AE3.** Beijing—Chongqing—Yangzi-rivero—Yichang—Wuhan—Shanghai—Qingdao (14 tagoj)
- AE4.** Beijing—Qufu (hejmloko de Konfuceo)—Taian (Taishan-monto)—Qingdao (9 tagoj)
- AE5.** Beijing—Yanji (Changbai-monto)—Beijing—Qingdao (7 tagoj)

### B. Postkongresaj ekskursoj


- PE1.** Qingdao—Taian (Taishan-monto)—Qufu (hejmloko de Konfuceo)—Shanghai (6 tagoj)



vino ĝuas reputacion en kaj ekster Ĉinio. La fridujo kun marko "Qingdao-Liebherr", la televidilo kun marko "Qingdao" kaj aliaj elektronikaj aparatoj havas grandan debiton en- kaj ekster-lande.

Estiel urbestro de Qingdao, mi rigardas kiel grandan honoron, ke Qingdao gastigos la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto. La magistrato kaj popolo de Qingdao faros siajn eblojn por sukcesigi la Kongreson, kontribuante al la amikeco kaj interkomprenigo inter la diverslandaj popoloj, al la kultura, scienca, teknika kaj komerca interŝanĝoj kaj al la paco kaj progreso de la mondo. Atendante esperantistojn el ĉiuj mondpartoj, mi sincere deziras al ĉiuj kongresanoj agrablan restadon en Qingdao!



Yu Zhengsheng  
Urbestro de Qingdao



## Qingdao indas la vojaĝon

**Q**INGDAO, situanta inter la montoj kaj la maro ĉe la orienta marbordo de Ĉinio, estas juna urbo kun riĉa historio kaj kulturo: ĝi elkreskis el fiŝista vilaĝo, kie vivis prahomoj jam antaŭ 5000 jaroj, kaj fariĝis urbo nur en 1891.

La rava beleco de la marborda naturo kaj la milda klimato tra la tuta jaro faras Qingdao ĉarma kaj ideala urbo por turismo, somerumo, ripozo, konferenco, komerco kaj oceanologiaj esploroj. Per si mem Qingdao estas vojaĝcelo, sed ĝi estas ankau porde al aliaj vojaĝceloj proksimaj kaj malproksimaj. Plej proksime al ĝi troviĝas Quŝu, la hejmloko de Konfuceo, kaj Taishan-monto, difinita de Unesko kiel unu el la mondaj heredaĵoj.



Kiel grava komerca urbo kaj ŝiptrafika haveno, Qingdao tradicie estas malfermita al ĉiuj kontinentoj. Ĝiaj urbanoj estas viglaj kaj gastamaj.

La Organiza Komitato de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto konsistas el funkcioj de la Ĉina Esperanto-Ligo, Esperanto-Asocio de la provinco Shandong kaj Qingdao-a Esperanto-Ligo kaj estas forte subtenata de la magistaro de Qingdao. Kun la Organiza Komitato kunlaboras la Qingdao-a Branĉo de la Ĉina Internacia Turisma Servo. Dum la kongresa semajno vi ne nur ĝuos bongustajn ĉinajn manĝaĵojn, komfortan logadon kaj oportunajn transportojn, sed ankau spertos riĉan kongresan programon, amikajn kunestadojn kaj intiman etoson en la Hotelo Huanghai, nia ĉi-foja kongresejo, situanta en la urbocentro mem kaj proksima al la marbordo je nur kelkminuta promendistanco. Supozante, ke ĉiu deziras iom turismi antaŭ aŭ post la Kongreso por konatiĝi kun Ĉinio, ekzotika kaj mistera por plej multaj esperantistoj, kaj pli proksime rilatiĝi kun ĉinoj, la Organiza Komitato aranĝos kunlabore kun ĈITS plurajn antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn proksimajn kaj malproksimajn, kun variaj karakterizaj programoj.

Ĉu necesas pliaj kialoj por vojaĝi al Qingdao? Oni atendas vian alvojaĝon. Kiel la urbo, tiel ankau la urbanoj!